

人民中國報道

El Popolo Cinese

Dec. 1952

12



AL VIENO POR PACO

SUNG ĈING-LING

*Estro de la Ĉina Delegacio en la Packonferenco
de la Azia kaj Pacifika Regionoj*

Kun plena sukceso finiĝis la Packonferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj. La bondeziroj de la popoloj en ĉiuj landoj estas la fundamento de ĝia sukceso. Volo de interkonsiliĝo estas la mortero, kiu sekure unuigis konferencon kun tia diverseco kaj amplekso. El tiaj materialoj konstruiĝas la unueco por paco, kiu estas senprecedenca en la Azia kaj Pacifika regionoj kaj havas gravan signifon ankaŭ al la tuta mondo.

La firma amikeco elforĝita en Pekino donas novan forton al la pacbatalo. Tiu ĉi konferenco solidarigis la popolojn longe dividitajn de distanco kaj eventoj de historio. En Pekino kunsidis latin-amerikanoj kun hindoj, kanadanoj kun birmanoj, usonanoj kun koreoj, ĉinoj kun mez-orientanoj, japanoj kun mongoloj, pakistananoj kun nov-zelandanoj. Kune laborante, ili akiris vastan perspektivon pri diversaj problemoj koncernantaj ĉiun landon, la tutan regionon kaj la tutan mondon. Profunda reciproka kompreno estas akirita de la fervora deziro de ĉiuj popoloj, ke estu kunlaboro inter la nacioj. Tio konkrete esprimiĝis en la fakto ke la gvidantoj por pacbataloj en Hindio kaj Pakistano publikigis komunan deklaron, en kiu ili asertis ke pacaj rimedoj povas kaj nepre necesas esti eltrovitaj por solvi la disputojn inter tiuj du landoj. La konferenco samtempe esprimas ĝian unuaniman subtenon al la postulo, ke ĉiuj popoloj rajtas elekti sian propran vivomanieron. Estiĝis intima kvazaŭ-familia rilato ne ekzistinta antaŭ kelkaj semajnoj, kio levis la klopodon por mondpaco al pli alta nivelo.

Tiu ĉi grava kontribuo farita de la popoloj en la Azia kaj Pacifika regionoj por la paco inspiris esperon al ĉiuj popoloj. Ĝi fortikigis ilian decidemon rebati per firma agado ĉian minacon al la homaro. Ĝi multe altigis la konscion jam kreskantan en multaj landoj, ke la milita minaco kreskas en lastaj monatoj, sed ke la popolo havas forton kaj rimedon ŝanĝi la direkton de la eventoj. Ĝi donis pli grandan signifon al milionoj da subskriboj jam kolektitaj al la demandoj pri malpermeso de ĉiuj armiloj amase detruaj, pri packontrakto inter la kvin potencoj, pri limigo kaj redukto de la armado, pri fino de la revivigo

de la militarismo en Japanio kaj Okcidenta Germanio kaj pri la tuja ĉesigo de nunaj militoj. Kio pli grava estas tio, ke ĝi kreis kondiĉon por unu el la gravaj eventoj en nuna epoko—la Popola Kongreso por Paco en Vieno.

La delegitoj de la Packonferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj reiris hejmen. Ili estas diskonigantaj inter la 1600 milionoj da popolanoj en la regionoj la emociojn kiuj ilin kortuŝis kaj la gravajn rezoluciojn kiujn ili atingis demokratie en Pekino. Ili estas propagandantaj kiel ili ĉiuj kun granda sincero rekomendas la justan kaj racian interkonsiliĝon kiel rimedon ĉesigi militon kaj solvi la malkonsentojn inter nacioj; kiel ĉiuj volas liberan negocon kaj kulturen interŝanĝon; kiel ĉiuj malamas la politikon produkti pafilajn kiam pano mankas al la popolanoj; kiel ĉiuj deziras mildigi la streĉecon, esti amikoj kaj konstrui feliĉan vivon en ĉiuj landoj.

Ĉio ĉi estas la volo de ĉiuj honestaj homoj, ne gravas kiaj estas liaj vidpunktoj kaj kredoj. Tiu ĉi volo devas esti esprimita per ĉiaj rimedoj kaj faras ĉiujn vojojn kondukantaj al la Popola Kongreso por Paco en Vieno. La popolo devas garantii, ke la paclaboro saltos ambaŭ spirite kaj esence de Pekino al Vieno kaj de Vieno al venonta venko.

La popolo povas kaj devas savi la pacon!



PACON!

de Kiang Ĉaŭ-ho

Usono Intencas Pereigi la Armistican Intertrakton

Instigante la Ĝeneralan Kunvenon de la Unuigitaj Nacioj aprobi ĝian proponon, kiu celas deteni la militkaptitojn, Usono nur intencas malhelpi la remalfermon de la armistica intertrakto kaj por ĉiam pereigi la haltigitan intertrakton. La paco en Koreio ja pendas sur unu haro, tamen Vaŝingtono timas la realiĝon de la armistico kaj nun penas rompi ĉi tiun maldikan haron.

La armistico jam tiel proksimiĝis ke ĝuste kiam Generalo Nam Il faris novan proponon por solvi la stagnantan situacion, Vaŝingtono estis devigata ordoni Harrison interrompi la intertrakton, kiu jam daŭris por 15 monatoj. Laŭ ordono Klark rifuzis daŭrigi la interrompitan intertrakton, kaj Vaŝingtono nun ordonis la satelitajn landojn en la Ĝenerala Kunveno de Unuigitaj Nacioj aprobi la Usonan proponon kiu celas plilongigi kaj plivastigi la militon, tiamaniere fermante la pardon al plua intertrakto.

Dum la kunveno de Unuigitaj Nacioj, Usono okupiĝis pri plej malnobla, senhonta trompo por daŭrigi la militon kaj havigi al la Usonaj milionuloj pluan profitegon. La Usona reprezentantaro kaj iliaj ĉiamaj eĥantoj denove ripetis tiun falsan mensogon ke ili nepre daŭrigos la militon ĉar ili ne povas "reenpatriigi devige la militkaptitojn." Sed la fakto klare vidita de la tuta mondo estas: dum la lastaj kelkaj monatoj la koreaj kaj ĉinaj militkaptitoj kiuj havas nenian defendilon estas senĉese mortigitaj per Usonaj pafiloj kaj tankoj kun flamjetiloj. Klark jam asertis ke ili traktos per forto tiujn militkaptitojn kiuj daŭre esprimos sian volon reiri hejmen. Laŭ lia diro, do tia sanga mortigado al la militkaptitoj ankoraŭ daŭros.

Usono fabrikis la mensogon ke la militkaptitoj "estos kondamnitaj al morto aŭ aliel punitaj" post reenpatriigo kaj per tia preteksto ili prokrastas senfine la armisticon longe atendatan de la tuta mondo. Sed ĝis nun la Usona komandejo ne kuraĝas malkonfesi ke ili perforte devigis la militkaptitojn al spionaj agadoj. La usonanoj diris al tiuj militkaptitoj ke la Usona radistacio disaŭdigas iliajn spionajn agadojn se ili forkuros hejmen. Nun tiuj militkaptitoj kiuj estis devigitaj al spionaj agadoj, kaj la Usona piloto Harrison kiu sendis ilin teren, estas en la mano de la Korea Popola Armeo kaj la Ĉinaj Popolaj Volontuloj.

Fake ĉiu Usona preteksto rifuzi reenpatriigi la militkaptitojn estas antaŭlonge refutita de koreaj kaj ĉinaj reprezentantoj ĉe Panmunjom. La propono de Generalo Nam Il klare difinis ke la unuigita teamo de Ruĝ-kruca Asocio garantios la hejmenrevenon de la militkaptitoj por konduki pacan vivon. Koncerne al tiuj militkaptitoj, kiuj estis tatuitaj per hontindaj sloganoj aŭ devigitaj skribi artikolojn kiuj malkuraĝigas ilin reveni, la parolanto de la Korea Popola Armeo kaj la Ĉinaj Popolaj Volontuloj jam diris en lasta aprilo ke ili mem ne havas respondecon pri tiaj agoj.

Tiu parolanto ankaŭ diris ke ni jam garantiis en la interkonsento ke ĉiuj militkaptitoj reunuiĝos kun siaj familianoj, partoprenos pacan konstrulaboron kaj kondukos pacan vivon.

Eĉ Senatano Wiley de la Usona reprezentantaro ne povis ne konfesi ke "memvola reenpatriigo" aŭ "nedevisa reenpatriigo" ne havas bazon en internaciaj leĝoj. En sia disaŭdigo per "Voĉo de Usono" li konfesis ke dum la formulado de Ĝeneva Konvencio la propono pri "malpermeso al la detenanta lando reenpatriigi militkaptitojn ne volantajn reiri" ne estis "aprobata". Li estis devigita prezenti alian argumenton ke ili detenis la militkaptitojn por doni al ili "rifuĝejon". Sed tiu argumento estis jam antaŭlonge refutita de Generalo Nam Il ĉe Panmunjom. Generalo Nam Il montris al silentigita Harrison ke neniu artikolo en la Ĝeneva Konvencio permesas la miksigon de militkaptitoj kun politikaj krimuloj. Ĉiu lando kiu ne volas disŝiri la Ĝenevan Konvencion ne povas toleri la Usonan "rifuĝejo"-pretekston kiu celas deteni militkaptitojn.

Por peli plue milojn kaj milojn da Usonaj, anglaj kaj alilandaj armeanoj al morto, la Usona flanko tutintence elpensis pretekstojn tute senbazajn. Ilia plej nova, ekstreme absurda preteksto estas: estus "nehonora" afero se ili plenumus la devon pri la reenpatriigo de ĉiuj militkaptitoj kiu estas difinita en la Ĝeneva Konvencio subskribita de la plejparto de ĉiuj landoj tutmondaj. Evidente la "honoro" en la buŝo de la imperiistoj estas disŝiri la solenan intertraktaton kaj iniciati agresan militon.

La tuta mondo tre klare vidas ke Acheson kaj la Usona reprezentantaro en la Ĝenerala Kunveno de Unuigitaj Nacioj parolaĉas sub masko de "humaneco" dum ili sin okupas pri nehumanaj kruelaĵoj, daŭrigante la sangverŝigon en Koreio kaj malpermesante al ambaŭflankaj militkaptitoj reiri hejmen.

— Tradukis I. K. —



Fortigo de la fundamentoj de Britia-Usona "Amikeco"

— Boris Jefimov

Sovetiaj Specialistoj en la Industria Konstruado de Ĉinio

Siaŭ Feng

La industria konstruado de nova Ĉinio jam komenĝis. La internaciaj amikoj de la Popola Ĉinio—Sovetiaj industriaj specialistoj, donis al ni grandegan helpon tiuflanke.

Iuloke en Nordorienta Ĉinio, la Sovetiaj specialistoj helpis al Ĉinio konstrui fabrikon de peza industrio, ili laboris kiel por sia hejmlando.

Iu elektrologia specialisto diris: “Kiam mi ricevis la taskon iri al tiu ĉi nove leviĝinta kaj frata lando—Ĉinio, por helpi la industrikonstruadon, mi jam pensis en mi, ke tio estas tasko samkiel servo al mia propra lando kaj ke mi certe devas fidele plenumi tiun gloran taskon.” Tiu ĉi lia simpla kaj varma parolo vere elspiris la komunan penson de ĉiuj specialistoj.

Por helpi nin konstrui industriigitan landon, la specialistoj vere laboras sindoneme. Foje iu specialisto havis severan bronk-doloron, sed premante sian bruston li daŭrigis la laboron. Oni lin persvadis iri por kuraco, sed li diris ke estas multe da laboro kaj li ne devas foriri. Oni daŭrigis persvadi trifoje, sed li ne konsentis kiel antaŭe. Fine kiam oni venigis aŭtomobilon, li diris ke ankoraŭ post du tagoj li certe iros. Ili ne nur depost sia alveno en Ĉinio, sed ankaŭ kiam ili ankoraŭ estis en sia hejmlando, jam tiel prizorgis pri la konstruado de tiu ĉi grava fabriko de Ĉinio. Ekzemple, iu specialisto, kiam li esti en Moskvo, trovis ke en la mendilo sendita de la ĉina fabriko mankas iuj necesaj precizaj instrumentoj, li tuj proponis ke ili estu aldonitaj.

La specialistoj ne nur laboris sinofereme, sed ili ankaŭ ĉiam entuziasme instruis teknikon al la ĉinaj laboristoj. Unu el ili diris, “Tio ne estus tasko plenumita, se oni nur kompletigus la fabrikon kaj ne elinstruus teknikajn laboristojn.” La kurso de veldado en la fabriko estis fondita je lia iniciato. Ĉiutage utiligante la ripoztempon post tagmanĝo, li skribis lecion por la kurso kaj instruis la laboristojn. Li multe dediĉis sian energion al tiu kurso. Li sciis, ke por bone instrui, oni antaŭ ĉio devas komprenigi la interpretiston. Tial unue li instruis al la interpretisto pri iuj fundamentaj principoj kaj samtempe ankaŭ pri la velda metodo. Tiamaniere, li scipovigis multajn laboristojn pri la progresiva velda metodo.

Per la aplikado de elektra veldado kaj termika veldado, ne troviĝis eĉ unu vinkto sur la ŝtalskeleto kaj la vaporujo de la kaldronego en ĉi tiu fabriko. La laboro plenumiĝis bone kaj rapide pro la uzado de tiu ĉi progresiva metodo, kiu ne nur ŝparis laboron sed ankaŭ garantiis sekurecon.

Laboristoj de civila inĝenierado, lerninte la progresajn metodojn, starigis la grandegajn ŝtal-framo kaj muldplatojn de giganta maŝinbazo de 470 kubmetroj kaj enverŝis la tutan betonon en unu fojo. Laŭ la malnova metodo oni devas enverŝi betonon en apartajn platojn unu post la alia. Tiamaniere inter la platoj sin trovos kuniĝo, kiu fendiĝos post longa funkciado de la maŝino. Nun la maŝinbazo, konstruita laŭ nova metodo, kaj en kiu ne troviĝas kuniĝoj, havas

pli grandan ŝarĝkapablon, kaj estas pli longdaŭra dum uzado. Plie, por la konstruado de tia grandega bazo oni bezonus duon-monaton laŭ la malnova metodo. Sed nun tri tagoj estas sufiĉaj. Tie ĉi la Sovetiaj specialistoj instruis la progresajn teknikojn en spirito de internaciismo, kaj la ĉinaj laboristoj, respondante, en arda patriotisma spirito ilin lernis kaj mastrumis. Por rapidigi la industrikan konstruadon de sia patrolando ili soife lernas de la Sovetiaj specialistoj. Ekzemple, la laboristoj de la laborejo ĉe la kaldronego preferis ne hejmeniri por tagmanĝi, sed resti en la fabriko por aŭskulti la instruon de la Sovetia specialisto.

Ni tute havas kialon por kredi, ke, havante instruiston kaj amikon kiel Sovetunio, ni baldaŭ havos armeon da teknikaj laboristoj, armitaj per la plej progresiva tekniko de la mondo. Tiu ĉi armeo estas absolute necesa por la industriigo de Ĉinio.

La supredirita nur prezentas miniaturon kiél la Sovetiaj amikoj helpas nin en la konstruado de Ĉinio. El tio ĉi oni jam povas facile vidi, kial la ĉina popolo ĉiam konsideras la Sovetian popolon kiel sia plej kara frato kaj plej fidinda amiko.

trak. Nelsono.

La Flava Rivero Subjugiĝas

(daŭrigo de p. 271)

La Popola Registaro nun planas ekspansii la irigaciajn projektojn en Ningŝia- kaj Suijuan-provincoj. La areo irigaciata en tiuj regionoj estas nun 5 milionoj da muoj (333,333 hektaroj) kaj ĝi estos plivastigita al 15 milionoj da muoj (1 miliono da hektaroj) en la estonteco. Plibonigoj estas farotaj en akvo-provizado, drenado kaj superakvego-forigado. La planita Huangjang-kluzo en okcidenta Suijuan-provinco estas nun finkonstruita. La nova projekto iom post iom plivastigos la areon de la irigaciata tero al 2,700,000 muoj (180,000 hektaroj).

Dum la tri pasintaj jaroj la Popola Registaro jam faradis esplorojn pri la ĉefa rivero kaj ĝiaj enflantoj por projekti ampleksan planon por reguligo de la tuta akvo-sistemo de la Flava Rivero. Oni opinias ke la sola solvo por tiu problemo estas konstruado de digoj kaj akvo-rezervejoj sur la mezaj partoj de la rivero. Taŭgaj lokoj por tiaj konstruaĵoj estas jam difinitaj. Kiam tiuj planoj estos efektivigitaj, ili ne nur fundamente forigos la minacon de superakvegoj, sed, per la regado super la rivero, produktos grandkvanton da elektro kaj irigacios vastajn kampojn.

La Flava Rivero, kiu por miloj da jaroj estis la plej ruiniga rivero en Ĉinio, estas nun obeeme subjugita. Sub la gvidado de Prezidanto Maŭ Ze-tung kaj pro la subteno de la aktiva kaj kreema popolo kaj per la helpo de la Sovetia sperto, ni estas certaj ke ni unu fojon por ĉiam neniigos la lastan restantan minacon de la rivero kaj alportos daŭran sekurecon al la popolo loĝanta laŭ ĝiaj bordoj.

Trad. I. K.

Malferma Letero al la Aviadistoj de la 18a Batala-Bomba Aeroplano-Grupo en Suda Koreio

Kvankam tiu ĉi letero estas al la aviadistoj de la 18-a Batala-Bomba Aeroplano-Grupo, tamen ĝia enhavo ankaŭ taŭgas por ĉiu Usona aerarmeano fluganta en Koreio.

Kelkuij el la 18-a Grupo kredeble ankoraŭ memoras mian nomon. Vi eĉ memoras, ke mi estis paffaligita en Norda Koreio je la 4-a de marto. Sub mia nomo oni skribus "perdiĝis dum plenumado de tasko". Tio ĉi estas ne tute korekta. Mi ne perdiĝis—sed ankoraŭ tre bone vivas! Mi falis pro difektiĝo de la flugmaŝino, kaj tiam komenciĝis nova ĉapitro de mia vivo. Mi ankaŭ povas diri, ke ĝi ja estas la plej grava ĉapitro de la historio de mia vivo.

Verŝajne vi konsentus, ke vi ĉiuj estas bonkoraj. Nun mi demandas al vi: Ĉu vi ĝojas? Ĉu vi estas gajaj dejetante bakteri-bombojn sur la koreanojn? Ĉu viaj koroj permesis al vi tiel fari kaj vi sentis vin tute trankvilaj? Mi pensas, ke tio ne estas ebla. Mi scias, ke mia memoro pri la tasko de bakteria milito bruliĝas en mia koro. Mi ne povas ĝin forgesi. Mi ne kredas, ke iu ajn el vi estas tiel senkora ke li jam ĝin forgesis, aŭ, opiniante ke tio estas nur necesajo dum milittempo, jam ĝin preterpasis per ŝultrolevetoj. Kiu el vi volas vidi vian patrujon detruita de bakteria milito? Neniu el ni tion deziras. Kial, do, ni tion faris? Certe ne pro la 100-dolara pago de aerveturado. Ĉu vi volas vendi vian animon antaŭ tiu malluma altaro pro la 100 dolaroj? Ne forgesu, miaj amikoj, en la venonta pagtago ne ĉiu el vi estos ricevanta la monon.

Kelkaj el vi ne komprenas kial mi skribis tiun ĉi leteron. Mi diru al vi. Mi devas skribi ĝin pro tio, ke mia konscienco igis min skribi. Mia justa sento devigas min paroli. Mi skribas tiun ĉi malferman leteron, ĉar nun estas la ĝusta tempo kiam oni devas laŭtvoĉe krei la ĉesigon de la freneza ago dissemi infektan malsanon. Depost kiam mi estis kaptita, mi ricevis de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj nur bonan traktadon. Mi eksciis la teruraĵon, kion nia armeo faris, kaj mi proprokule vidis la urbojn kaj vilaĝojn tute detruitajn de bombadoj. Eĉ niaj propraj militkaptitejoj ne estas sekuraj. Nun iuj aviadistoj, mi ne scias kiuj ili estas, jam faligis bakteri-bombojn al la militkaptitejoj. Ĉu tiel vi traktas viajn samlandanojn? Mi alvokas al homeco, mi supozas, ke ĉiu homo havas homecon en si ekde sia naskiĝo.

Ĉesigu tian barbaran masakron, kaj tuj nun ĝin ĉesigu! Ne plu lasu unu bombon fali sur la teron de Koreio. Iu ajn idioto povas ellerni aerveturadon kaj bombardadon. Sed vi estas homoj, havantaj cerbon por pensi kaj animon por singvidi. Ĉu tiu ĉi animo vin gvidas, kiam vi faligas bakteri-bombojn? Aŭ ĉu vi estas gvidataj de falsaj vortoj de la homoj, kiuj al vi diris, ke la bakterimilito estas la humana rimedo de masakro?

Kiel ajn vi tiun ĉi demandon rigardas, la respondo restas la sama—bakteria milito estas el la konataj militoj la plej malnobla, plej barbara kaj plej malhumana milito.

En bakteria milito, la ĉefaj suferantoj estas la senkulpaj popolanoj de Koreio kaj Nordorienta Ĉinio. Tiuj ĉi popolanoj ne volas militon. Ili ege malamas militon.

La frenezaĵo, kio estas tiel nomita "polica agado", tute ŝanĝis la ĉiutagan vivon de tiuj popolanoj. Tamen vi vestis vin en bonorda "polica" uniformo kaj mortigas, vundas tiujn senkulpulojn, kiuj neniam vin atencis. Ĉu tio estas rimedo por dissemi bonvolon?

Kion vi povas fari? Ĉu vi diras, ke vi nur agis laŭ la ordono? Nun aŭskultu. Haltu por iom pensi, kaj estu justa al vi mem. Ĉiu el vi, ĝis la lasta homo de la lasta vico, devas ĉesigi la aerveturadon de bakteria milito. Certa estas unu afero (ĝi estas fakto matematika): bakteri-milita aerveturado sen aviadistoj egalas al neekzisto de bakteri-milita aerveturado. Uĉu vorton plie, ili ne povas submeti la tutan Grupon al la milita tribunalo. Laŭte parolu, kamaradoj, por aŭdigi viajn voĉojn! Unuiĝu kaj agu unuece! Ke vi rifuzas dejeti bakteri-bombojn "estos aŭdita de la tuta mondo."

Vi diras, ke mi estas militkaptito, sidante rigardas la spektaklon en la sendanĝera zono de Norda Koreio. Mi diru al vi, ke faligante bakteriajn bombojn vi estas tute senkompataj al la militkaptitoj. La "spektaklo", kiun mi rigardis, estas ja abomeninda kaj malagrabla. Kiam venos la tempo de likvido, oni ne havos lokon por sin kaŝi. Ĉiu, kiu partoprenas en la bakterimilito, devas rekoni sian respondecon. Ĉu vi ne scias, ke la flut-blovanto estas ludanta la melodion de morto? Ĉu vi, dancante laŭ tia melodio, jam kapturiniĝas kaj perdas la prudentecon?

Tiel vi rigardu. Vi deziras iri hejmen. Mi ankaŭ. Ni ĉiuj volas vivi en mondo paca. Jen estas la respondo. Unue, ni ĉesigu la militon bakterian! Tiu ĉi estas la ŝlosilo por tute solvi nian problemon. Due, solvu per pacaj rimedoj la Korean militon. Ĉu tio ne estas tre simpla? Jes, tre simpla, kaj tre facile farebla, se vi konsentos alpreni la necesan rimedon. La fina solvo tute de vi dependas. Ĉu vi faros tiel grandan kontribuon al la homaro? Nur la tempo tion pruvos. Nun imagu al vi, ke ekzistas mondo, en kiu ne estas bombado, ne troviĝas bakteri-armilo por mortigi la homojn. Ĉu la respondo ne estas klara? Elektu la ĝustan vojon, kaj estu decidema. Tiel farante, vi ne nur faras bonon al vi mem, sed ankaŭ helpas min kaj la tutan homaron. La celo ne povas pravigi la rimedon. Por la estonteco de via lando, laŭte krii: "Nun jam estas la tempo! Ĉio dependas de vi!"

Mi nur povas vin peti kaj postuli, ke vi ekagu por la reĝustigado. Mi nur povas batali per vortoj. Mi estas jam translokigita de la 18-a Batala-Bomba Grupo en la Unuan Pacbatalantan Grupon. Mi atendas kun zorgo vian ekagon. Faru vian parton, por ke la "spektaklo" havu bonan finon.

Ni ĉanĝu la melodion de la flutblovanto, ni dancu laŭ la paca melodio. Kiel brila kaj harmonia estos la pacmelodio! Nun ne estas tempo por esti timema. Parolu! Agu! Via klopodo porpaca estos honorata.

Mi salutas al miaj konatoj ĉe vi—kaj petas ke vi bone memoru tiun ĉi celon en viaj koroj.

Sincere via,

Floyd O'Neal (subskribo)

La 15-an de julio, 1952.

La Granda Sukceso de Novĉinia Agrikulturo en la Pasintaj Tri Jaroj

Vang Keng-kin

La agrikultura produktado de Ĉinio estis grave detruata kaj paralizata de ambaŭ japanaj kaj Kuomintang-aj banditoj dum la ok-jara Kontraŭ-japana Milito kaj tri-jara Liberiga Milito. En 1949, kiam la Centra Popola Registaro ĵus stariĝis, la tutlanda produkto de greno malpliigis je kvarono kompare kun tiu antaŭ la Kontraŭ-japana Milito, kaj tiu de kotono, je duono. Dombestoj estis buĉitaj en grandaj nombroj kaj kelkloke eĉ pli ol 40% de la tuta dombestaro estis forbuĉitaj. Kaj cetere estis teruraj plagoj, kiel inundo, trosekeco, malsano, fiinsekta plago k.a..

Dum la pasintaj tri jaroj post la stariĝo de la Popola Registaro, la agrikultura produkto de Ĉinio, sub la gvidado de la Ĉina Komunista Partio kaj la Centra Popola Registaro, rapide reviviĝis kaj disvolviĝis. Oni kalkulas antaŭe ke, en tiu ĉi jaro la tuta produkto-kvanto de greno atingos 109% kaj tiu de kotono atingos 155% de la historia plej alta jarprodukto. Brutoj, agrikulturaj instrumentoj, sterko k.a. ankaŭ atingos aŭ superos la nivelon antaŭ la Kontraŭjapana Milito.


La granda sukceso de agrikultura produkto de nova Ĉinio montriĝas en la jenaj flankoj:

1) La rapida restariĝo de agrikultura produktado garantiis la liveradon de vestaĵo kaj nutraĵo por la tuta popolo, provizis industriajn materialojn kaj radikale ŝanĝis la duonkolonian ekonomian staton importi eĉ grenon kaj kotonon de eksterlando. Samtempe post la agrara reformo la vivnivelo kaj aĉetpovo de la kamparanoj estis evidente altigitaj. En la malnovaj liberigitaj regionoj, 80-90% de la kamparanoj leviĝis ĝis la nivelo de mezkamparano, ankaŭ en la novaj liberigitaj regionoj mezkamparanoj nombriĝas plej multe. Dum la pasintaj tri jaroj la aĉetpovo de la popolo plialtiĝis

je 25%, kaj la investopovo de la kamparanoj por produkto ankaŭ ege pli altiĝis. Ekzemple, en la Sudokcidento, la reprodukta investo de kamparanoj en 1951, pliigis je 84% ol 1950, ĉie ili aĉetis veturilojn, brutojn kaj sterkon, rebonigis instrumentojn, entreprenis akvokonservajn konstruojn kaj disvolvis la agrikulturan produkton.

2) Sub la direkto "Organiziĝu!" kiun Prezidanto Maŭ donis, rapide disvolviĝis la agrikultura kooperativa kaj interhela movado. Ĝis la fino de la unua duono de tiu ĉi jaro, jam pli ol 40% de la kamparanoj partoprenis en produkta interhela grupo. En la malnovaj liberigitaj regionoj 70-80% de la kamparano aliĝis al ili. Krome, pli ol 4,000 agrikulturaj produktaj kooperativoj organiziĝis. La organizitaj kamparanoj ludis la rolon de pioniroj en la kampanjo de patriota pliprodukta konkurso. Laŭ nekompeta statistiko tra la tuta lando jam 1,000,000 tiaj interhelpaj grupoj partoprenis la konkurson. La altiĝo de agrikultura tekniko, produkta pliigo, montris la superecon de organiziĝo. Precipe la agrikultura produkta kooperativo prezentis la jenajn progresajn trajtojn: (1) Sur la fundamento de ankoraŭ ne ŝanĝita sistemo de privata poseda de agraro estis adoptita la metodo: terpeca kunigo, unueca administrado, kaj racia utiligo de tero. (2) Aplikiĝis novaj instrumentoj kaj ĉevaltirataj plugiloj en la Nordoriento, kaj reformiĝis la malnova labormetodo. (3) Unuece plani kaj planti, racie disponi laborfortojn, interrilatigi agrikulturan kaj flankan produktojn, kaj paŝon post paŝo venki la mankecon de et-kamparana ekonomio. Agrikultura produkta kooperativo estas plua disvolviĝo de interhela grupo, kaj samtempe la prepara paŝo al kolhozo. Ĉie la sperto pruvas, ke la rikoltaĵo de interhela grupo estas pli multa ol tiu de individua laborfamilio, kaj tiu de kooperativo estas ankoraŭ pli multa ol tiu de interhela grupo. En Ĉangĉi-gubernio de Ŝansi-provinco, en 1951, la meznombra produkto de unu muo estis 124.5 kg. por individua laborfamilio, 131 kg. por interhela grupo, sed 155.6 kg. por agrikultura produkta kooperativo. En Anĵang-gubernio de Pingjuan-provinco en 1951, la produkto-kvanto de tritiko de ok tiaj kooperativoj superis tiun de individua laborfamilio je 33% kaj tiun de interhela grupo je 25%. Tio montras la ĝustan direkton de disvolviĝo de novĉinia agrikulturo.

3) Laŭplana batalado kontraŭ la plagoj de la naturo. Dum la pasintaj tri jaroj por tutlanda akvokonserva konstruado oni fosis 1,700,000,000 kubmetrojn da tero, riparis 42,000 kilometrojn da digo, konstruis la grandajn inundakvajn detenejojn de Ŝetoŭĉuang ĉe la Flava Rivero kaj ĉe King-rivero. La unuapaŝa plano pri subjugado de Huaj-rivero estis jam fundamente efektiva kaj nun triumfe antaŭeniras plu. Krome oni ankaŭ dragis Ji-riveron kaj Ŝu-riveron, tial inundo maloftiĝas jaron post jaro kaj la areo de inundata regiono ankaŭ malvastiĝas. Dank' al la klopodoj fosi putojn, irigaciajn kanaletojn, kaj lagetojn kaj konstrui akvobarilojn, pli ol 40,000,000 muoj da irigaciata tero estas akiritaj kaj reakiritaj. Ĉiujare milionoj da kamparanoj organiziĝis por malebligi insekto-plagon. En



Riĉa kotonrikolto en 1952

la okcidenta parto de la Nordoriento oni plantis grandan forstzonon pli ol 1,000 kilometrojn longan kaj pli ol 300 kilometrojn larĝan por rezisti sabloventegon kaj gardi agrikulturan produkton. En la provincoj Ŝantung kaj norda Kiangsu, ĉe marbordo ankaŭ komenciĝis konstruado de kontraŭventa forsto. Ĉi tiuj klopodoj kontraŭ naturaj plagoj estas nur la preludo, tamen tiel grandskala laboro ankoraŭ neniam okazis en Ĉinio kaj eĉ neniam antaŭe povis okazi.

4) En la tri jaroj, la plibonigo de instrumento kaj altigo de tekniko ankaŭ montris rimarkindan sukceson. Disliveriĝis kelkcent mil modernaj ordinaraj kaj ĉevaltirataj plugiloj, per kiuj oni povas plugi je 4-5 cm. pli profunde ol per malnovaj. La spertoj pruvis ke la pliprofunda plugo povas pliiĝi la produkton je 10-20%. Oni resumis la terkulturajn spertojn de la kamparanoj kaj lernis la spertojn de Sovetiaj antaŭirantoj. La ĉefaj punktoj estas: (1) Selekti bonan semon por ke la plantaĵo plibone kresku. Bona grenspeco ĝenerale donas 10% pli multan produkton (ekz: la maizo Ora Reĝino, la batato Venko 100); (2) Racie konservi kaj uzi sterkon. Bone konservita sterko altigas la efikon je 50%, kaj cetere estas bezonate prepari verdajn sterkon (krom luzerno kaj enteromorfo*, oni ankaŭ povas prepari verdan sterkon el foliriĉaj arboj kiel arbusta lespedezo†, sofforo purpura‡ ktp., kiujn oni povas planti sur nekulturita tero aŭ kalva monto). Oni ne nur devas plivastigi la fonton de sterko sed ankaŭ bone atenti kiam sterkon, kiam kaj kiom oni devas uzi por atingi la produktan celon; (3) Racie interspaci la vicojn de plantaĵoj. En la pasinteco ni plantis la grenplantaĵojn ĉiam tro maldense: en unu muo 1,000 kotonplantoj estis plantitaj, kaj la interspaco inter la tritikvicoj estis 45 cm. Nun plantiĝas 2,000-6,000 kotonplantoj po muo kaj multe pliiĝis la produkto. La interspaco inter tritikvicoj reduktiĝis ĝis 15 cm, kaj la produktokvanto povas pliiĝi je 30%. Akva rizo ankaŭ devas esti plantita je konvena denseco. Lastan jaron, akva rizo de Ĉen Jung-kang, modeloterkulturisto, estis riĉe rikoltita je 700 kg. po muo, parte dank' al plidensa plantado; (4) Alterna plantado. Estus iom malfacile nun adopti grandskale la alternan plantadon de furaĝherbo kaj cerealo en Ĉinio, sed estas kompreneble praktikeble, ke oni plantu alterne diversspecan cerealon ĉiujare por eviti malfekundiĝon de la tero, kaj malsanojn al la plantaĵoj. Ĉiuj ĉi tiuj estas gravaj kondiĉoj por abunda rikolto.

5) Virinaj laborfortoj ĝenerale partoprenas en agrikultura produktado. En plejmulto de la regionoj 60% de la virinaj laborfortoj partoprenis agrikulturadon kaj iuloke eĉ 90%. En ŝtataj farmoj, agrikulturaj kooperativoj kaj interhelpaj grupoj la partoprenantinoj konsistigis 40%-60% de la tuta kamplaborantinaro, kaj ili formis nemankeblan gravan forton en la patriota pliprodukta kampanjo. Lastan jaron la 17 agrikulturaj produktaj kooperativoj de Ĉefang-vilaĝo de Liaŭsi-provinco, havis 120 partoprenantinojn sed dum okupa sezono ankoraŭ 1,000 laborantoj estis dungataj pro manko de laborforto. Tiun ĉi jaron, la virinolaborantoj en la kooperativoj pliiĝis ĝis 170 kaj altigis la laborefikon, tiel ke dungatoj ne plu estis bezonataj. Cetere, virinoj ne nur partoprenis diversajn laborojn en la produkta kooperativo, altigis sian agrikulturan teknikon, sed aperis inter ili multe da eminentaj direktoroj kaj subdirektoroj de la kooperativoj kaj interhelpaj grupoj. Ili fariĝis gvidantaj kadroj de la agrikultura produktado. En la kampanjo de patriota pli-

produkta konkurso ankaŭ aperis multaj modelaj laborantinoj de agrikultura produktado. La virinoj ne nur komprenas ke en la interhelpa organizo oni povas atingi pliriĉan rikolton sed ankaŭ ke "nur per la disvolvado de la interhelpa kaj kooperativa movado la virinoj povas atingi plian liberigon!"

En la tri jaroj, sub la gvidado de la Ĉina Komunista Partio kaj la Centra Popola Registaro la ĉinaj diligentaj kaj bravaj kamparanoj plenumis la alvokon "Organiziĝu!" kaj sukcese plenumis la taskon revivigi la agrikulturan produkton. De nun, ili fortege disvolvos la kampanjon de kooperado kaj interhelpo kaj patriota pliprodukto, altigos sian teknikon, disvolvos produkton por akiri pli grandan venkon en la batalo de agrikultura produktado.

trad. Nash

* *Marĉa vegetaĵo*

† *Lespedeza bicolora*

‡ *Sophora sp.*

Unu Tago en Montvilaĝo

(daŭrigo de p. 278)

Vanĉjo kondukis nin rekte al Nankou. Post nelonge jam aŭdiĝis intermite paroloj kaj ridoj de la fundo de la ravino. Post du turniĝoj kaj malsuprenirinte iun deklivon, ni ekvidis gajan, vivecan scenon: El rok-fendo ĉe la montpiedo ŝprucas pura fonto kiu formas rivereton. Ĉe la riverbordoj multaj gejunuloj estis lavantaj vestojn kaj piedojn, praktikante purigan higienan movadon. La diverskoloraj vestoj sunumataj sur la herbo kaj la rokoj apud la riverbordoj vidate de malproksime, ŝajnis multaj plene florantaj floroj. Kelkaj infanoj estis postkurantaj unuj la aliajn tien kaj reen. Aliaj estis ĵetantaj ŝtonetojn al ranoj en la rivereto. Plej proksime de ni, iu ĉirkaŭ dudekjara juna kamparano estis tordlavanta belan florŝtofan veston sur glata ŝtono. Rimarkinte tion, Vanĉjo demandis ridante.

"Ĉu vi estas lavanta veston por via edzino? Ja modelo!"

"Ĉu oni ne devas tion fari?" refutis la junulo aplombe, sed lia vizaĝo ruĝiĝis kaj balbutante li sin pravigis, "Ĉu viroj kaj virinoj ne estas egalaj? Ŝi lavas por mi kiam senokupa. Do kial mi ne povas lavi por ŝi kiam mi havas tempon?"

Ĉiuj eksplodis per ridoj. La paro de gejunuloj lavantaj vestojn kontraŭe de li ridis plej laŭte. Ĉajĉjo, raportisto de Ŝinhua-a Novaĝ-agentejo fotografis ĉi tiun gajan epizodon. Trovinte objekton de kontraŭatako, la priirdata junulo diris al la paro de gejunuloj ĉe la kontraŭa flanko, "Kiu ajn vidos vin kune fotografitaj kiel nun, nepre asertos ke vi estas intersvatan-taj."

Ĉiuj refoje ekridegis, eĉ pli ĝoje kaj pli laŭte. Tra la tuta valo vibris feliĉa eĥo.

Trad. Nojo Lo.

* *Flava tero.*

‡ *Ĉar en la vilaĝo ne estas publikmanĝejo.*

† *Senhava persono rifuĝinta el sia naskiĝloko pro natura katastrofo.*

La Flava Rivero Subjugiĝas

Ĉiang Han-ĵing

Vicministro de Akvokonservado

La Flava Rivero, fama pro sia kaprico kaj nevenkebleco, nun ŝanĝis sian malnovan trajton sub la jugado de la nemezurebla forto de la liberigita ĉina popolo.

Estinte oni klopodis ĝin subjugi nur ĉe ĝiaj malsupraj partoj kaj sekve estis nur defensiva rimedo, t.e. eviti superakvegojn. Post la liberigo, unueca projekto estas proponita por reguligi la riveron laŭ ĝia tuta longeco kaj utiligi ĝiajn ekonomiajn eblecojn.

Jam multon atingis la nova projekto. Hodiaŭ la ĉefaj novkonstruitaj digoj de la rivero bone eltenas la provon de tempo. Parto el ili, en la regionoj liberigitaj en 1947, jam nun firme staras por kvin jaroj. La popolanoj loĝantaj laŭlonge de la rivero sentas sin sekuraj. Ĝoje ili sin okupas pri siaj propraj laboroj kaj ne plu maltrankviligas pri tio, ke kian sorton la rivero alportos al ili morgaŭ. Subiĝinte al la regado de la popolo, la Flava Rivero nun irigacias tritik- kaj koton-kampojn; ĝia akvo enfluinta en la Vej-riveron navigebligas tiun riveron inter Ŝinŝiang kaj Tienzin kun distanco de 900 kilometroj.

La ĉefa parto de la Flava Rivero longas 4,400 kilometrojn. Ĝi kuras trans naŭ provincoj kaj ĝiaj branĉoj trafluas areon de 770,000 kvadrat-kilometroj (ne enalkulante la aluvian ebenaĵon apud la malsupraj partoj). Dum multaj jarcentoj la baseno de la Flava Rivero estis la plej prospera parto de Ĉinio. Sed en pasintaj jarcentoj la malfavoraj naturaj kondiĉoj kaj plie la egoismo de la regantaj klasoj, kiuj neniam zorgis la popolon, alportis foje kaj refoje katastrofojn. Registroj montris ke en la periodo inter 602 a.K. kaj 1938 p.K. la digoj de la malsupraj partoj detruigis meznombro kvarfoje po dek jaroj, rezultigante ĉiam seriozajn superakvegojn. Depost 2278 a.K. kiam la Imperiestro Ju provis superregi la riveron ĝis 1938 en nia nuna tempo, la Flava Rivero ŝanĝis sepfoje sian vojon kaj dum la inundo miloj da kvadratmejoj da tero estis superakvitaj, sennombraj domoj estis forportitaj kaj nekalkuleblaj perdoj okazis al homa vivo kaj riĉaĵoj.

Eble la superakvego en 1938 plej vivece klarigas la kriman egoismon de la reakcia reganta klaso kiu intence alportis detruon al la popolo. En tiu jaro Ĉiang Kaj-ŝek, kiu ne povis haltigi la antaŭenpuŝigon de la japanaj invadantoj pro la korupteco disvastiĝanta inter siaj armeanoj, ordonis siajn trupojn detruigi la digojn ĉe Huajuankoŭ en Honan-provinco, tiel deturnante la akvon suden en la direkton de la invadantoj. Tiu superakvego disetendiĝis sur vastaj regionoj kaj la inundo daŭris proksimume naŭ jarojn. Duon-miliono da popolanoj estis mortigitaj.

La superakvego kaŭzita de la digodetruo de la Flava Rivero paralizis la akvo-sistemon de la Huaj-rivero kaj tiamaniere alportis ruinojn al milionoj da popolanoj en la Huaj-baseno. Nur post la liberigo en 1949 kaj la konsekvenca starigo de la popola registaro helpo venis al la turmentita popolo. La registaro mobilizis pli ol du milionojn da laborantoj kaj kamparanoj por plene rearanĝi la river-sistemon en la regiono de Huaj-rivero. En malpli ol du jaroj, 400 milionoj da kub-metroj da tero estas elfositaj, modernaj digoj

kaj akvorezervejoj estis konstruitaj kaj la domaĝoj kaŭzitaj de la kruelaj agoj de Ĉiang Kaj-ŝek estis forigitaj.

Danĝeroj ĉe la Malsupraj Partoj

Plej ofte la superakvego okazis laŭlonge de la malsupra parto de la Flava Rivero, kiu etendiĝas 820 kilometrojn de Meng-zin en Honan-provinco al la estuaro. Laŭ la esplorado fare de geologiistoj la tuta vasta ebenaĵo oriente de Ĉengĉoŭ estas formita el aluvio de la rivero. Do, estas facile imageble kiel grandan kvanton da ŝlimo kunportis la rivero.

Inter 1934 kaj 1942 la akvo kiu fluis tra la Ŝen-gubernio estis meznombro 51,700 milionoj da metro-tunoj ĉiujare, sed la kvanto de ŝlimo kunportita estis meznombro 1,890 milionoj da metro-tunoj. La mezkvanto de ŝlimo ĉiujara estis taksita je 3.6 procentoj. Kvankam tiu estas alta cifero, tamen ĝi estas nenio kompare kun la maksimumo registrita de la hidrografia stacio en Ŝen-gubernio, kiu estas 46 procentoj.

La tro granda kvanto de sedimento kunportata de la rivero kaj la plateco de la ebenaĵo apud la malsupraj partoj kaŭzas amasiĝon de la ŝlimo kaj plialtiĝon de la riverfluejo inter la protektaj digoj. Tiel la fluejo oriente de Ĉengĉoŭ fariĝas pli alta ol la apudaj kampoj. En kelkaj lokoj la akvo-surfaco estas 4-7 metrojn pli alta ol la ekstera tero dum akvega periodo. La konstanta rompo de la digoj dismetis river-ŝlimon sur la inundita areo kaj el tio formiĝis malkruta deklivo supren ĝis la rando de la rivero (kun dekliveco de proksimume kvin milonoj.) Tio estas la unua trajto de la Flava Rivero.

Tiu ĉi trajto de la Flava Rivero necesigis du rimedojn: (1) Digoj devis esti de tempo al tempo plialtiĝataj por adaptiĝi al la ĉiam altiĝanta fluejo; ju pli alte leviĝis la fluejo, des pli malfacile fariĝis la protekto de la bordo; kaj (2) Grandaj penoj devis esti farataj por rekonduki la riveron al ĝia originala fluejo post kiam ĝi rompis la bordojn.

La dua trajto de la rivero estas la granda volumeno de akvo-fluo dum julio, aŭgusto, septembro kaj oktobro. La tuta volumeno de akvo dum tiuj kvar monatoj estas 61 procentoj de la tutjara flukvanto. En 1942, la plej alta registro pri akvo-fluo de la hidrografia stacio en Ŝen-gubernio estas 29,000 kubmetroj posekunde; en la sama jaro la plej malalta registro estas 250 kub-metroj posekunde—la diferenco atingis 116 oblojn. La sama stacio ankaŭ registris pli grandan diferencon je 180 obloj.

La fakto ke la Flava Rivero estas tre granda kaj kun grandega ŝanĝiĝo de akvo-volumeno klarigas la necertecon de la fluejo: la rivero ŝanceliĝas dekstren-maldekstren kaj la profundeco de ĝia fluejo varias de tempo al tempo. Tiu ĉi trajto kaŭzas multajn katastrofojn kaj malfaciligis la taskon fari la riveron navigebla aŭ utiligebla alimaniere por la popolo.

Komenco de Vera Subjugado

Post la liberigo la popola registaro ne nur komencis subjugar laboron laŭlonge de la malsupra

parto sed ankaŭ preparis ampleksan planon por reguligi la tutan fluejon kaj la akvo-sistemon de la baseno de la Flava Rivero. La celo estas ne nur malebligi superakvegojn sed kombini la diversajn projektojn al la grandskala ekspluatado de la naturaj provizoj de la baseno.

Ĉar pasis nur tri jaroj post la starigo de la popola registaro, la ĝisnuna laboro pri la Flava Rivero povas esti rigardata nur kiel komenco de estonta disvolvigo. Sed kelkaj el la atingoj estas jam menciindaj. Unue, la laboro pri digo-fortikigo kaj bordo-protektado. Ekde la jaroj de liberiga milito ĝis la nuna tempo 82,200,000 kubmetroj da tero estas uzitaj por pliigi la altecon kaj dikecon de la digoj; 1,740,000 kubmetroj da ŝtono kaj brikoj kaj 180,000 tunoj da salik-branĉoj kaj gaŭliang-tigoj estas uzitaj por plifirmigi la river-bordojn sur la malsupra parto.

Depost la liberigo oni taksas ke la efikeco de la laborantoj pri digo-riparo kaj urĝa prizorgado de danĝeraj lokoj estas 250 procentojn pli alta ol tio dum la Kuomintanga periodo. Ŝton- kaj ter-digoj konstruitaj de ili kontraŭstaras akvo-fluegon dum kvin jaroj sen ia difektiĝo. Kin Ĉaŭ, digo-konstruanto, inventis drat-alenon por trovi la traflutojn en la digoj kaj tiamaniere pli certigas la digo-protektadon.

La amo al la popola registaro instigis la popolon loĝantan laŭlonge de la rivero al altgrada entuziasmo en ilia batalo kontraŭ la minaco de superakvegoj. En 1949 troviĝis ekstreme alta fluo: la nivelo de la akvo sur la malsupra parto proksime de Ŝoŭĉang- kaj Fangubernioj superis la plej altan registron de 1937 je 1.5 metroj. La ŝvelanta akvo vipis kaj puŝis la digojn kaj kaŭzis 430 tratruojn. En tiu kriza momento pli ol 350,000 loĝantoj apud la danĝeraj partoj organizis teamojn sub la gvidado de la registaro por batali kontraŭ la inund-minaĉo laŭlonge de digo 760 kilometrojn longa. Post furioza batalo tra dudek tagoj, kaj noktoj ili venkis la akvo-fluegon kaj savis la vivojn kaj posedaĵojn de kelkaj milionoj da homoj.

Sed por eviti la katastrofojn ni ne devas tro fidi nur al la plifortigo de la digoj laŭlonge de la malsupra parto; estas necese trovi fundamentan solvon de la problemo. Antaŭ ol efektiviĝi pli grandan kaj fundamentan projekton la registaro, en 1951, asignis monon por konstrui akvo-elfluejon ĉe la vilaĝo Ŝetoŭĉuang sur la norda bordo de la rivero, en Pingjuan-provinco. La akvo-elfluejo estis finkonstruita en tri monatoj; de majo ĝis aŭgusto 1951. Ĝi estas 1,500 metrojn longa kaj povas forkonduki 5,400 kubmetrojn da akvo en unu


sekundo. Kiam ajn la akvo-fluego atingas danĝerajn punkton, parto de la akvo estos alkondukata tra la elfluejo al iu deten-baseno inter la ĉefaj digoj sur la norda bordo kaj la Kin-digo (ekstera digo sur la norda bordo). La finkonstruado de la akvoelfluejo garantias ke superakvegoj ne okazos apud la malsupraj riverpartoj eĉ se la akvo-fluego atingus la altecon de 23.000 kubmetrojn posekunde, kio ja estas la dua plej alta registro de la hidrografia stacio en Ŝen-gubernio.

La malsupra parto de la Flava Rivero fluas nord-orienten trans la regiono kie la klimato estas pli kaj pli malvarma kiam ĝi proksimiĝas al la maro. Tio signifas ke tiu sekcio de la rivero proksime de la maro degelas pli malfrue, tiel ke la glaci-flotaĵoj venantaj el la supra parto estas detenataj kaj fariĝas siavice obstrukco en la rivero. Krome, la malvarma temperaturo kaj kelkfoje la subita ŝanĝo de la vetero ofte kaŭzas la aglomeradon de la disigitaj glaci-flotaĵoj kaj formas pli grandajn blokojn. Tiam la rivero estas barita kaj la akvo leviĝas, fluas ekster la digojn kaj kuras senbride sur la najbarajn kampojn. Krom utiligi aeroplanojn por eksplodigi kaj rompi la glaci-flotaĵojn kaj blokojn, la Popola Registaro konstruis en 1951 akvo-elfluejon ĉe Lizin en Ŝantung-provinco. La Lizin-akvoelfluejo povas forkonduki la leviĝantan akvon je 1,000 kubmetrojn posekunde kiam la rivero estas barita per glaci-flotaĵoj dum la printempa degelado, tiel liberigante Lizin-on de la minaco de superakvegoj.

Alia projekto estas la Popola Triumfa Irigacia Kanalo, unu el la unuaj de tiuj projektoj por akvo-konservado laŭlonge de la malsupraj partoj. La kluzo staras ĉe la norda fino de la Pekino-Hankou-fervoja ponto. Akvo povas esti forkondukata norden je la rapideco de 50 kubmetroj posekunde. Krom alporti akvon al miliono da muoj (66,700 hektaroj) da tero, la irigacia kanalo plialtigas la akvo-nivelon de la Vej-rivero kaj faras ĝin navigebla tutan jaron inter Ŝinŝiang kaj Tienzin.

Ĉio ĉi tio estas nur komenco de la laboro por subjugi la Flavan Riveron kaj ĝin utiligi por la bono de la homaro. Sed tiu unua paŝo jam forigis de la najbaraj loĝantoj la timon pri la rivero. Unu el la terkulturistoj esprimis sian opinion: "Kiu ja povus imagi pri tio, ke la Flava Rivero irigacias anstataŭ inundi nian kampon? Dum miloj da jaroj nia popolo konis nur katastrofojn. Por nia nuna feliĉo ni devas danki nenium alian krom la Komunista Partio kaj la Popola Registaro!"

(daŭrigo sur p. 266)



La Huangjang-kluzo sur la Flava Rivero. Finkonstruita en majo, 1952

Konstruado de Nova Liangŝan

— Ju King-ĉi —

En la orienta parto de Sikang-provinco, inter la riveroj Tatu kaj Kinŝa, kuŝas montoza regiono—Liangŝan, kiu estas la plej granda amasloĝejo de la minoritato Ji. La unuan de oktobro, 1952, okazis tie la Unua Regiona Kongreso de Popolaj Delegitoj Diversnaciaj, kaj konforme al la Detala Programo de Regiona Aŭtonomo de Minoritatoj, kiun publikigis la Centra Popola Registaro, kaj laŭ la komuna volo de la Ji-popolo, fondiĝis Liangŝan-a Popola Registaro de Ji-nacia Aŭtonoma Regiono.

La aŭtonoma regiono konsistis el la antaŭa Ĉaŭkjuo-a Ji-nacia Aŭtonoma Regiono kaj la nove establita ses gubernioj, Puge, Ŝite, Kinjang, Mejku, Puto kaj Puŝjung, kun tuta areo de pli ol tridek mil kvadrataj kilometroj, kaj kun pli ol 700,000 Ji-loĝantoj kaj pli ol 20,000 loĝantoj de nacioj Han kaj Miaŭ.

Ĝi estas granda peco da fekunda tero, kun multaj fruktodonaj valoj meze de la montaroj, tra kiuj fluas la riveroj Mejku, Siŝi kaj Puŝjung. En la valoj kaj montoj la Ji-popolo plantas avenon, fagopiron, terpomon, rizon kaj fabon. En la arbaroj abunde kreskas diversaj medicinaj vegetaĵoj kaj lutroj (kies felo estas valora vestomaterialo). Herboriĉaj paŝtejoj faras Liangŝan'n unu el la ĉefaj produktaĵoj de la fama Seĉuan-a ĉevalo. Mineraloj sub la tero estas senlime riĉaj. Tamen dum multaj jaroj ĉi tie skribiĝis la mizera historio de la Ji-nacio. Ekzemple: en la jaro 1946, la banditĉefo Ĉiang Kaj-ŝek jam persone ordonis dufoje da atakoj kontraŭ la Ji-popolo en Puŝjung per kvar regimentoj kaj kun helpo de aeroforto. Plie, la reakciaj regantoj incitis la Ji-popolon reciproke malami kaj venĝi inter si mem, kaj tiamaniere faras la socion treege senorda. Rememorante la tiaman staton, la Ji-popolo diris: "Tiam, ni bezonis gardanton dum plugado, loĝante en la domo ni ne kuraĝis malfermi la fenestron. Ni ne kuraĝis paŝti en malproksima loko. Dormante ni devis havi pafilon brakumita. Neniu kuraĝis migri pli malproksimen ol dek kilometrojn."

Pro tia sieĝata izoliteco de la Ji-popolo en la montoza regiono, la miskompreno inter la nacioj Ji kaj Han pliprofondiĝis, kaj ilia vivo fariĝis tre mizera. Tiutempo, ne ekzistis en la tuta regiono eĉ unu bazaro kaj ne ekzistis normala interŝanĝo de varoj. Grenprovizo ne kovris la bezonon por duonjaro. Mankis salo kaj ŝtofo ĝis nekredibla grado. Ne troviĝis en la tuta regiono eĉ unu lernejo.

Post la liberigo, la Sikang-a Provinca Registaro, plenumante la politikon pri minoritatoj, sendis "Liangŝan-laborgrupon" profunde en la altajn montojn kaj densajn arbarojn por propagandi la politikon pri egaleco, unuiĝo, kaj interhelpo inter la nacioj. La laborgrupo kunvokis diversajn kunsidojn kaj amaskunvenojn, alvokante la Ji-popolon al unuiĝo por konstruado de Liangŝan. La sincereco de la laborantoj tuj forigis la dubon kaj heziton de la Ji-popolo. Sub la helpo de la laborgrupo ili fondis interpacigan komisionon tutregionan kaj dudek komisionojn lokajn. Dum du jaroj ili interpacigis entute pli ol tri mil diversajn konfliktojn, el kiuj multaj estas eĉ inter "mortaj malamikoj" de dekoj da jaroj. En la komenco de lasta jaro, la tuta delegitaro, pli ol ducent tridek personoj, faris en kunsido, antaŭ la portreto de Prezidanto Maŭ

Ze-tung, "unuiĝan kontrakton de tuta regiono", kaj juris ke ili malaperigu por ĉiam la tradician armilbatalon. Detiam, aperis senprecedenca solidareco en Liangŝan-regiono.


Sur la bazo de unuiĝo inter nacioj, dum du jaroj ekstarigis unu post la alia sepdek du distriktoj kaj vilaĝaj popolaj registaroj. Multaj aktivuloj, kiuj aperis en la movadoj de unuiĝo kaj de banditekstermo, estis ensorbitaj en la laboroj de registaro. La Nacia Lernejo en Siĉang jam edukis por Liangŝan nombron da Ji-laborantoj por registara laboro.

Por plibonigi iom post iom la ekonomian vivon de la diversaj nacioj, ĉiurangaj registaroj gvidadis la popolon de Ji kaj aliaj nacioj disvolvi la patriotisman produkto-kampanjon. La popola registaro, krom establi kvar ŝtatajn agrikulturajn kaj paŝtajn farmojn kiel modelojn, en la kuranta jaro jam sendis proksimume dudek produktajn gvidgrupetojn, kiuj iris profunde en diversajn lokojn por gvidi la kamparanojn pri irigacio, kaj plibonigo de produktita tekniko, kaj distribuis al la kamparanoj 300,000 kilogramojn da rizo kaj pli ol 8,000 pecojn da terkulturiloj. En la tuta regiono ĉirkaŭ 21,000 kamparanoj sin organizis en 457 produktogrupetoj kaj estis en vigla kulturado. La kamparanoj jam certgrade altigis sian teknikon de produktado. Al la lokoj kie suferis katastrofon de hajlo, la popola registaro faris senprokraste helpojn kaj gvidis la amason refoje semi en ĝusta tempo. Pro ĉiuj ĉi tiuj rimedoj, ĉijare estis senprecedence abunda rikolto en la tuta regiono. La ĉefaj nutraĵoj kiel fagopiro kaj terpomo, produktiĝis pli multe ol en la lasta jaro je kvindek procentoj.

Ankaŭ la komerco en Liangŝan-regiono multe disvolviĝis. La enspezo por diversaj special-produktaĵoj estis tridek procentoj el la tuta enspezo de la popolo en la regiono. Nun jam estas fonditaj diversrangaj ŝtataj komercaj organizoj kaj kvar elementaj bazaroj. La ŝtataj komercaj organizoj sendis multajn migrantajn komercajn grupetojn en vilaĝojn por aĉeti la special-produktaĵojn, kaj por liveri fabrikaĵojn por ĉiutaga vivo. Plie, la ŝtata komerca kompanio ĝustgrade plialtigis la prezojn en la aĉetado. Ĉi tiun jaron, la popola registaro komencis konstrui vojon por ĉeval- kaj multtrafiko, kondukantan de Ĉaŭkjuo al Siĉang. Aliaj tri poŝtaj vojoj kiuj trairas tra la tuta Liangŝan-regiono, kaj la ŝoseo kondukanta al Seĉuan-provinco, estas ankaŭ konstruataj. Tiuj vojoj faros Liangŝan-regionon pli kaj pli prospera. La aspekto de la vilaĝoj en Liangŝan-regiono jam multe ŝanĝiĝis. Multaj kamparanoj havigis al si novajn vestaĵojn kaj aĉetis brutojn. La infanoj estis senditaj al lernejoj por lerni siajn naciajn lingvojn. El siaj propraj travivaĵoj ili profunde ekscias ke Prezidanto Maŭ Ze-tung kaj la Komunista Partio estas la savanto de popolo de diversaj nacioj. Ili varme amas la disvolvantan feliĉan vivon kaj sian patron.

Depost la fondiĝo de la Ji-nacia Aŭtonoma Regiono, la popolo de la diversaj nacioj daŭre konstruos kun perfekta memfido novan Liangŝan sub la gvidado de la Ĉina Komunista Partio kaj ĉiurangaj registaroj.

—Elĉinigiĝis Honĉo—





Prezidanto Maŭ Ze-tung kaj gvidaj membroj de la Centra Popola Registaro kaj oficistoj de la Ĉinia-Sovetia Amikeca Asocio kun gvidantoj kaj membroj de la Sovetia kultura delegacio, vizitantaj artaj grupoj kaj la Ruĝflaga Kanto-danco-grupo de Sovetia Armeo je la akcepto je la 6a de novembro en Pekino.

La sceno ekster la Pekina Stacidomo kie ĉirkaŭ 5 homoj kolektiĝis por saluti la alvenon de siaj Sovetiaj amikoj je la 2a de novembro.

Plifortigo de Ĉinia-Sovetia Amikeco

Je la invito de la Ĉinia-Sovetia Amikeca Asocio, eminenta Sovetia kultura delegacio, grupoj de artaj kaj kinomatografiaj laborantoj kaj la Ruĝflaga Kanto-danco-grupo de Sovetia Armeo konsistantaj entute el 299 personoj alvenis al Ĉinio por partopreni la landskalan celebradon de la Ĉinia-Sovetia Amikecomonato. La agadoj de tiu amikecomonato komenciĝis je la 7a de novembro, la 35a datreveno de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio.





Parado de ĉevalidoj breditaj el famaj grandan intereson de la publiko bone inf


Rajdistinoj de diversaj nacioj atendas sian vicon ĉe la ĉevalkonkurso kiun oni aranĝis kiel parton de la ekspozicio de brutoj en Norda Ĉahar, Interna Mongolio.

Ekspozicio de Brutoj sur la Libera Herbejo de Interna Mongolio

Per pruntedonoj de mono, bredo-stacioj kaj aliaj rimedoj post la liberigo de la kamparanoj kaj nomadoj, la Popola Registaro helpis la bredantoj de dombrutoj de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio por plibonigi iliajn brutarojn. Multaj ekspozicioj de brutoj estas aranĝitaj por disvastigi sciencajn metodojn de brutobredado.

de interŝanĝantaj sukcesigajn sekretojn en ĉevalkonkurso.

Posedantoj kaj animaloj atentantaj la juĝon de gradoj.






kaj lokaj rasoj levis
rmita ĉe la ekspozicio




Plezuro de la ĉeval-
listoj! Vetkurado tra
la vasta stepo estas
trajto de la Nord-
Ĉahar-a Ekspozicio
de Brutoj.

Blua kokardo estas donita al la venkinto.

Ankaŭ li certe fariĝos venkinto!





Pli ol 40,000 anoj de Popola Liberiga Armeo kaj Pekinaj junuloj aplaŭdis la superban prezentadon de la Ruĝflaga Kanto-danco-grupo de Sovetia Armeo en la Pekina Popola Stadiumo.

Memorindaj Momentoj de la Ĉinia-Sovetia Amikeco-monato en Pekino

laboristoj de la Ŝekingŝan-a Elektrejo bonvenigas la vizitantajn Sovetiajn artistojn.



La granda rigardantaro ege ĝuis la raran humoron de la Sovetiaj dancistoj.



Sovetiaj dancistino Tamara A. Ĥanum (maldekstre) kaj kantistino Ĥalima Nasjrova babilas kun Mej Lan-fang, ĉina plej fama ludanto de klasika Pekina opero.



Sovitiaj kaj ĉinaj dancistoj, muzikistoj kaj teatraj laborantoj interŝanĝas kreivajn spertojn ĉe tiu ĉi kunveno en la Pekina Internacia Klubo.



Unu Tago en Montvilago

Tien Liu

Frumatene de la lasta tago de aŭgusto, 1952, kiam ankoraŭ pendis kelkaj briletantaj steloj sur la ĉielo, Vanĉjo vekigis. Sin vestante, li parolis al si mem, "Estas ree dimanĉo! Kiel rapide...."

"Kiel koncernas nin dimanĉo?" intence demandis Cajĉjo kiu kuŝis apud li.

"Ĝi multe koncernas nin," respondis Vanĉjo kiu jam sin finvestis kaj ellitigis. "Ĉiuj kooperativanoj ripozas kaj vi ankaŭ ne povas labori."

En la pasinteco, nur la publikaj oficejoj kaj lernejoj observis la sistemon de "dimanĉa ferio," dum la kamparanoj kiuj ĉiam laboradis de mateno ĝis vespero tra la tuta jaro kompreneble ne sciis kion signifas "dimanĉo." Kune kun du fotografistoj-raportistoj de la Ŝinhua-a Novaĵ-agentejo, mi alvenis al la vilaĝo en la hieraŭ vespero post mallumiĝo. Ĵus alveninte ni renkontis tian freŝnovan aferon—ke eĉ en vilaĝoj estas nun ankaŭ dimanĉaj ferioj. Kiel la kamparanoj pasigas sian ripoztagon? Kion ili faras je ĉi tiu tago? Demandite de ni per ĉi tiaj demandoj, Vanĉjo diris, "Hodiaŭ mi ne ripozu sed akompanu vin pasigi ĉi tiun dimanĉon. Vidinte per viaj propraj okuloj, vi ĉion scios."

La Pasinteco de Jaŭŝangkoŭ

Vanĉjo, kies plena nomo estas Vang Kin-jun, estas sekretario de la filio de la Kompartio kaj samtempe prezidanto de la agrikultura produkto-kooperativo. La vilaĝo estas nomata Jaŭŝangkoŭ, montvilaĝo en Vuŝiang-gubernio, Ŝansi-provinco. Ĝiaj transformiĝo kaj nuna stato povas bone reprezenti tiujn de la vilaĝoj en la malnova bazregiono de la Tajhang-montaro. Sin trovas en la vilaĝo pli ol ducent dudek familioj, inter kiuj pli ol cent sepdek aliĝis al la agrikultura produkt-kooperativo.

La vilaĝo Jaŭŝangkoŭ situas sur tre alta loesa* montspino. Starante ĉe la pordo de domo, oni povas rigardi tre malproksimen. Ĉirkaŭ la vilaĝo vidiĝas ĉie profundaj, serpentumantaj ravinoj. Mi ne povis klare memori de kiu ravino ni alvenis hieraŭ vespere. Dum la periodo de Kontraŭ-japana Rezistmilito, la vilaĝanoj utiligis ĉi tiujn senfine variemajn "labirintajn ravinojn" por lukti kontraŭ la malamikoj kaj ĉiun fojon la malamikoj forkuris post granda malvenko. En 1943, la milicanoj de Jaŭŝangkoŭ pafmortigis okdek japanajn bandidojn kaj kaptis pli ol dek en la daŭro de ok monatoj, kaj helpate de la Okavoja Armeo kaj la ĉirkaŭaj popolanoj finfine devigis la malamikojn retiriĝi. Sed la tiama bona topografio en la rezisto kontraŭ la malamikoj nun fariĝis granda obstaklo en la produkta konstruado: La distanco inter unu kampo kaj alia ŝajnas tre proksima, tamen se oni efektive iras, oni devas jen malsupreniri ravinon, jen supreniri krutajon kaj sekve la vojo estas almenaŭ du-tri lioj (1 lio = ½ kilometro). Plie, la serpentaj vojetoj estas tiel krutaj kaj mallarĝaj ke sur ili povas iri nek brutoj nek ĉaroj, tial ĉiuj transportaj laboroj de fekaĵo, tero kaj rikoltaĵoj devas esti plenumataj nur surŝultre. Pli malfacile estas ke mankas akvo. Eĉ se oni fosas okdek aŭ cent futojn profunden, ankoraŭ tie estas nur sekega loesa tavolo. La akvo por trinkado estis ĉiam la akvo de someraj kaj aŭtunaj pluvoj konservata en kontraŭsekaj keloj.

Pro tio la rikoltoj de Jaŭŝangkoŭ estis ĉiam minacataj de sekegeco. "Kiel bone estus se iam ne plu mankus al ni akvo," diris Vanĉjo, klarigante al ni la pasintan staton de la vilaĝo, "kaj tiele niaj plantajoj kreskus pli abundaj."

En la Legomĝardenoj

Post la matenmanĝo, ni ekiris al la vilaĝgrando por pririgardi. Estis serena tago. La ĉielo estis helblua kaj la suno brila. Arbombroj presiĝis sur la tero kiel lignogravuraĵoj. La milda aŭtuna zefiro alsendis la aromon de la maturiĝantaj grenplantaĵoj. En la aero ŝvebis harmonie la ĉirpado de insektoj kaj la pepado de birdoj. La plejparto de la vilaĝgrando estas la legomĝardenoj de la kooperativanoj, en kiuj kreskas terpomoj, fazeoloj kaj kukurboj. La kukurboj jam estis maturaj kiuj kuŝis en la kampoj kiel grandaj pilkoj, resendante orangkoloran brilon sub la fruaŭtuna sunlumo. Kvan-kam je dimanĉo ni ne povis vidi la kortuŝan scenon de kolektiva laboro, tamen ni ankoraŭ vidis la kooperativanojn memvole laborantaj duope aŭ triope en siaj legomĝardenoj. Iu mezaĝa virino en nova bluaŝtofa vesto estis deprenanta kaj enkorbiganta manplenojn da delikataj fazeoloj. Apude staris sep-ok-jara knabino, sur kies kapo estis metita—ĉu tio estis farita de la patrino por la amuzo de la knabino aŭ estis eltrovo de la knabino mem ni ne sciis—granda kukurbfolio kiel pajloĉapelo, kaj sur ŝiaj du belaj ŝultroj balanciĝis je ĉiu ekmovo du brilaj harplektaĵoj kun diverskoloraj floroj alligitaj, kvazaŭ kelkaj papilioj estus ĉirkaŭflugantaj ĉirkaŭ ŝi.

La Agrikultura Produkto-kooperativo

"Ni jam estas ekster la vilaĝo. Do iru vidi niajn grenplantaĵojn?"

Kondukate de Vanĉjo, ni malsupreniris ravinon kaj surgrimpis deklivon kaj jen antaŭ niaj okuloj subite montriĝis arbarsimilaj grenplantaĵoj. La grenplantaĵoj kreskis eksterordinare bonaj. La gaŭliangoj staris en la kampo kiel arbetoj kaj la maiztigoj kreskis duhome altaj, kun korpulentaj spikoj sur la dikaj trunketoj kiel etendiĝantaj brakoj. Tiu ĉi estis la abunde-produktiva maizo, plantita en dek muoj (1 muo = 6.667 aroj). Vanĉjo diris ke ĉiu muo povas produkti almenaŭ mil kvincent ĝinojn (ĝino = ½ kg.).

"El ĉiu spiko kia ĉi tiu povas rikoltiĝi pli ol du liangoj (1 liango = $\frac{1}{16}$ ĝino) da greno," diris Vanĉjo, ameme karesante la miliospikon plate subtenatan en lia manplato, kiam ni alvenis kaj haltis antaŭ iu dense kreskanta miliokampo. La pinto de la spiko estis metita ĝis lia fingropinto kaj ĝia finiĝo jam atingis lian kubuton. "En ĉiu muo estas plantitaj naŭ mil ĝis dek du mil, tial rikoltiĝos pli ol mil ĝinoj. Tio ja superos la planon."

"Kiom estas laŭ la plano?"

"Okcent kvindek ĝinoj po muo."

La agrikultura produkt-kooperativo de Jaŭŝangkoŭ havas entute pli ol mil sepcent muojn da kampoj por aŭtunaj rikoltaĵoj kaj pli ol sepcent muojn da tritiko-kampoj. La meznombra produktokvanto de la kampo

atingos ĉijare 240 litrojn po muo. Ni ne povis ne miri ke tia spino de kalva monto kun sterila tero povas doni ĉi tian abundan rikolton. Vanĉjo diris al ni: Antaŭ la Kontraŭ-japana Milito, ĉiu muo ĉi tie povis produkti nur 118 litrojn. Post la detruado de la longdaŭra milito, la produktokvanto malaltiĝis plie ĝis 95.9 litroj en 1948. En ĉi tiu jaro ĝi estos pli ol duoble plialtigita ol antaŭ la milito kaj 250 procentoj de tiu en la jaro 1948. Alivorte, dum la tri jaroj de la grandioza konstruado de nia patrio, la kamparanoj de Jaŭŝangkoŭ 2.5-oble plialtigis la produktokvanton de la tero.

“Laŭ la direkto de Prezidanto Maŭ, ni organizis agrikulturan produkto-kooperativon,” respondis Vanĉjo al nia demando pri la kaŭzo de la rapida plialtiĝo de la produktokvanto. “La kampoj de la kooperativo estas sub unueca administrado, en kiuj ni plantas la por ili plej konvenan plantaĵon por plene disvolvi la utilecon de la tero. Krome, pro la multnombreco de la partoprenantoj, nia forto fariĝas pli granda. Ni povas pliiĝi nian investon al la tero, plugi ĝin pli profunde kaj kulturi ĝin pli zorgeme, ebenigi deklivan kampon transprenante teron de la supra fino al la malsupra, plibonigi la econ de la tero enmiksante sablon en la argilecan teron....”

La ankoraŭ ne finita parolo de Vanĉjo estis interrompita de alproksimiĝanta bruo. Aro da junuloj ridante elvenis el la vilaĝo kaj ekbrukriis kiam ili rimarkis nin. Iu diris, “Ha! Eĉ dimanĉe la Prezidanto ankoraŭ venas kontroli nian laboron?” Alia diris, “Prezidanto, kion vi bezonas? Mi aĉetos por vi.”

Kiam la aro da gajaj junuloj estis foririnta, Vanĉjo diris envie, “Kiel feliĉaj la hodiaŭaj junuloj estas! Kiam mi estis en tia aĝo kia ilia, mi estis servanta kiel jarlaboristo ĉe bienulo. Ne nur ripozon kaj oper-rigardon je dimanĉoj mi ne povis revii, eĉ je la Novjara Tago mi ankaŭ devis labori.”

La junuloj estis irantaj al opero ĉe Urbeto Panlung, ok liojn for de la vilaĝo, kie estis okazigata kunveno de interfluo de produktajoj—kiun Vanĉjo nomis “mulĉevala komerc-kunveno.” Tie estis tre movoplena, kaj krom la negoco de bovoj, muloj, ĉevaloj, kaj industriaĵoj kaj agrikulturaj produktajoj estis du ejoj kie operoj estis prezentataj.

Du Farmetoj

Vizitante la du “farmetojn” de la agrikultura produkto-kooperativo, ni komprenis pli konkrete la kaŭzon de la rapida disvolviĝo de la agrikultura produkto en Jaŭŝangkoŭ. Ili havas du farmetojn, t.e., agrikulturajn eksperimentejoj. Unu estas eksperimentejo por specoj kaj la alia, por kulturaj metodoj. Tiu proponas kiaj specoj estas taŭgaj por loka kulturado kaj ĉi tiu, reformojn en kulturaj metodoj. Ĉi tiun jaron la agrikultura produkto-kooperativo nur semis la en eksperimente selektitajn specojn kaj faris en diversaj flankoj reformajn laborojn agrikulturajn: La tuta tero estis plugita pli ol tri fojojn kaj la abunde-produktaj kampoj kaj “mezgradaj kampoj” estis plugitaj kvarfoje, la plugprofundeco estis ses coloj ĝis sep coloj; la tekniko de sterkado kaj sarkado estis ankaŭ prizorgata, la meznombra sterkokvanto en ĉiu muo estis naŭdek pikuloj, kaj por mezgradaj kaj abunde-produktaj kampoj, de 120 ĝis 150.... Ĉiuj ĉi tiuj rimedoj ebligis la grenplantaĵoj de la agrikultura produkto-kooperativo kreski abunde kaj la produktokvanton plimultiĝi jaron post jaro. Tamen, veran komprenon pri la supereco de la kooperativo super la individua kamparana ekonomio mi

gajnis nur post kiam ni estis vizitintaj la nove kompletigitan akvo-konservejon. Ĝi estas tre granda akvo-konservejo kiu liberigos tricent muojn da tero de sekegeco. La lukto kontraŭ sekegeco kaj la malpliigo de la minaco de sekegeco estis dum multaj jaroj la deziro kaj espero de la kamparanoj de Jaŭŝangkoŭ, kiuj hodiaŭ efektiviĝas.

Ĉe la Gastiginto

En la tagmezo mi tagmanĝis ĉe Han Kin-mu. Han persiste devigis min sidi sur la per nova felto kovrita briklito, kaj transdonante al mi vermicelon kun brasiko, li diris, “Mi iris rigardi operon. Mi ne sciis ke mi estas asignita provizi tagmanĝon al vi. Sekve nenio estas speciale preparita. Do havu ĉiutagan manĝon!”—Mi volis demandi kio estas la bona manĝo kiun li aludis, sed mi ŝanĝis la intencon kaj demandis, “Kion vi aĉetis en la foiro?”

“Nenion,” respondis Kin-mu, kaj levetante sian kapon al la direkto de sia juna edzino klarigis, “Mi intencis aĉeti por ŝi veston de flordeseĝna ŝtofo, sed la desegnoj ne plaĉis al mi. Tial mi ne aĉetis.”

Kiam ni sciigis ke en 1947 kiam li transloĝiĝis ĉi tien, li estis rifuĝinto, mi ne povis reteni mian miron.

“Al ĉiuj estas same,” Kin-mu diris. “Ĉies vivo estas pliboniĝanta tagon post tago.”

Kin-mu rakontis al mi la ŝanĝigon de vivstatoj de multaj familioj en la vilaĝo. Inter ili estas kamparano nomata Li Ŝuj-ĉung, kies familio konsistas el kvin membroj. En 1950 kiam ankoraŭ ne organiziĝis la agrikultura produkto-kooperativo, la tuta enspezo de lia hejmo estis 2000 litroj da greno. Lastjare li aliĝis al la kooperativo kaj en la grendivido post la rikolto ricevis 3710 litrojn. En ĉi tiu jaro lia deksesjara frato, anstataŭ paŝti ŝafojn por aliuloj, nun vizitas elementan lernejon. Kvankam en la familia ekonomio ne plu estas la laborpago de lia frato, tamen pro la daŭra plialtiĝo de la produktokvanto de la tero de la kooperativo, la enspezo de Li Ŝuj-ĉung ankoraŭ plimultiĝis ĉijare de la lastjaraj 3700 litroj ĝis 4200 litroj. Nur en du jaroj la enspezo pli ol duobliĝis. La grado de la ŝanĝo de vivstato estas imagebla.

Feliĉa Vivo

La abunda rikolto ne nur ŝanĝis la ekonomian trajton de la vilaĝo, sed ankaŭ ĝian kulturen trajton. En Jaŭŝangkoŭ nun troviĝas tri bibliotekoj dislokitaj en tri vilaĝoj, kiuj havas entute pli ol septcent librojn kaj abonas kvindek sep tagjurnalojn kaj gazetojn krome. Intime kunordigitaj kun la laboro de la bibliotekoj estas dudek sep ĵurnallaŭtleĝantoj kaj tri popollernejoj. La dudek kvar nigratabulaj gazetoj redaktataj de la partipropagandistoj daŭre donas edukadon al la kamparanoj pri patriotismo kaj kolektivismo. Posttagmeze ni vizitis la bibliotekon de Ketaŭ-vilaĝo. Ĝi estas en granda domo, tre bele aranĝita. Sur la muroj pendigas la portreto de Prezidanto Maŭ kaj multaj premiflagoj, kaj multaj libroj estas bonorde metitaj sur T-forma tablo. Ni vidis ke pli ol dek junuloj estas legantaj tie. La bibliotekisto diris al mi, “En ĉiun el la tri bibliotekoj venas ĉiutage ĉirkaŭ kvindek legantoj.”

“Ni iru al Nankoŭ (Suda Ravino),” proponis Vanĉjo kiam ni eliris el la biblioteko. “Tie ja estas la plej homplena loko je dimanĉoj.”

(daŭrigo sur 269)

Dekmil-jara Karbo Elterigas


La unua grandskala liberĉiela karbominejo de nova Ĉinio—la Hajĉou-a Liberĉiela Minejo de Fusin-a Minburoo en la Nordoriento estas nun konstruata. Tiel grandega estas la konstrua laboro de la minejo ke 560,000,000 kubmetroj da tero estis elfositaj nur por elterigi karbon. Tiu kvanto estas egala al tero elfosita por konstrui sep Suez-kanalojn aŭ tri Panama-kanalojn. Se tiom da tero estus amasigita en monton 90 metrojn altan, ĝi okupus 12,000 muojn da tero. Post la konstruiĝo de tiu ĉi liberĉiela minejo, ĝia ĉiujara produkto egalos al la entuta jara produkto de la karbominejoj de Ping-an, Hajĉou kaj Sinĉiu nun apartenantaj al la Fusin-a Minburoo. Ĝi esots unu el la malmultaj liberĉielaj minejoj en la mondo.

Por tiu ĉi liberĉiela minejo antaŭe oni faris ekspluatan planon, sed ĝi estis sentaŭga. Post la fondiĝo de nova Ĉinio, la mino venis en la manojn de ĉinaj laboristoj. Dank' al la frata kaj amika helpo de multaj Sovetiaj specialistoj pretiĝis plej progresiva, ekonomia ekspluata plano, dank' al kiu la elterigo de karbo plifruigiĝis je tri jaroj. Tiu ĉi nova minekspluata plano grandpaŝe antaŭenpuŝos nian hejtajo-industrion.

En la konstruado de tiu ĉi granda minejo, ĉiu laborulo havis saman senton: la helpo al ni donita de la Sovetiaj specialistoj estas tre granda. Ni menciis ĉi tie nur la sekvantajn du ekzemplojn. Laŭ la malnova konstru-projekto unue oni devas enfosi sulkon en la meza parto de la minejo, kaj poste disvastigi ĝin ĉiudirekten. Laŭ tiu malnova metodo oni devus fosadi ĝis la jaro 1954 por atingi la karbo-tavolon. Sed laŭ la plano farita de la Sovetiaj specialistoj oni ekfosis ĉe la plej maldika parto de la ter-tavolo, kaj poste etendis la foson en unu direkton. Tiamaniere la mino jam komencis produkti karbon ĉijare. Laŭ la antaŭa plano la tuta liberĉiela karbomino devas esti samtempe fosata. Sed la Sovetiaj specialistoj diris: "Tiamaniera ekspluatado estas malekonomia." Laŭ ilia plano unue oni devas elfosi la dikajn karbo-tavolon, kaj poste, elfosi la ceteran parton de la karbo-tavolo, kaj la terkruston kiun oni devas forigi por elfosi la karbon oni povas ŝuti en la senkarbigitan regionon. Tiamaniere oni ne nur povas malaltigi la produkto-koston, sed ankaŭ eviti la perdon kiu okazus en tutterena ekspluatado. La Sovetiaj specialistoj ĉie kaj ĉiam cerbumadas por la bono de nia tuta ekonomia konstruado. Ili ofte diras: "Homo estas la plej kara, kaj ne devas esti misuzata!" Ili tre alte taksas hom-forton, sekve, ĉie ajn kie oni povas uzi maŝinon, oni uzas maŝinon por anstataŭigi hom-forton. Sovetiaj specialistoj ne nur helpas nin teknike, sed ankaŭ pozitive edukis por ni multajn teknikajn laborantojn kaj administrantajn kadrojn. Dank' al lernado ekde aprilo, 1951 ĝis nun, multaj el niaj laborantoj, kiuj estis ne spertaj en tekniko de liberĉiela minado, jam povas administri teknike la minejon. Ĉijare la laborplano jam estis tute projektita de niaj teknikistoj. Dank' al la bona lernado kaj studado de la tuta laborantaro, dum la pli ol unu jaro en la minejo aperis multaj modelaj laboristoj kaj progresintaj produktantoj, kiuj eltrovis kaj elpensis multajn novajn instrumentojn, kaj kreis por nia lando grandan

riĉaĵon. La junaj kamparanoj Liu Huj-ven kaj Ĉeng Zung-li nenion sciis pri minado kiam ili venis al la minejo. Dank' al sia penado, ili tuj ellernis kiel manipuli Sovetian elektran ŝovelilon. Kiam ili trovis, ke ili ne povis bone ŝarĝi per la elektra ŝovelilo pro ne bona aranĝo, ili plibonigis la laborkondiĉojn kaj rezulte de ilia klopodo la laborefiko de la elektra ŝovelilo superis tiun laŭ la projekto. La kaŭzo de ilia fervoro en studo kaj laboro estas ĝuste kiel ili diris: "Mi havas perspektivon! Ĉu vi ne vidas la karbo-tavolon tie allogantan? Ĝuste tio. Ju pli multe da karbo kaj fabrikoj, des pli bone konstruiĝos nova demokratio kaj des pli frue efektiviĝos socialismo. Jen tio estas nia perspektivo." La maljuna laboristo Jang Huan-caj, sub la helpo kaj inspirado de Huj Feng-lin, membro de la Novdemokratia Junula Ligo, kreis "glitilon", per kiu oni povas ŝpari ambaŭ grandan homforton kaj multan tempon. Ĉiu laboristo de la liberĉiela minejo havas grandan ideon kaj plenan entuziasmon kaj laboras sinforgese. La konstruado de la Liberĉiela Minejo de Fusin en la Nordoriento dank' al fervora helpo de Sovetiaj specialistoj kaj penado de la tuta personaro, nun estas rapide progresanta. La tuta laboro de forigado de la terkrusto estas farita per maŝino. La laborefiko de Sovetia elektra ŝovelilo kiun oni aplikas tie estas tre granda. Unu tagon oni povas fosi per ĉiu maŝino pli ol 7,000 kubmetrojn da tero. Multaj elektraj ŝoveliloj turnas kaj fosas la teron en la minejo. Tiel rapide progresas la laboro ke se vi revizitus la laborejon post tritaga forestado, vi ne povus vin orienti ĉe la laborejo pro la granda ŝanĝiĝo de ĝia aspekto. Sur la fervojo tage kaj nokte kuras tien kaj reen la grandaj elektraj memmalŝarĝaj vagonaroj. La plej alta rapideco de tiuj ĉi elektraj vagonaroj estas 72 kilometroj po horo. Elektraj fadenoj, ruĝaj kaj verdaj signalolampoj tie kaj ĉi tie vidiĝas kvazaŭ muziknotoj. Se vi promenas sur la vojo, vi senkonscie haltiĝas, raviĝas de la novaj konstruaĵoj, kaj vi sentas ĝojon, ĉar la ekipaĵoj de la liberĉiela minejo estas tiel sciencaj, tiel progresaj. Nun jam malkovriĝis la karbotavolo el la tero. Post du jaroj granda kvanto da karbo el ĉi tiu minejo jam povos provizi al ĉiu loko de la lando. La kompletiĝo de tiu ĉi granda fundamenta konstruo signos al ni la baldaŭan komenciĝon de la grandskala ekonomia konstruado de nova Ĉinio.

Tradukis: K. S. Ho



Vaporaj fos-maŝinoj laboras ĉe la konstruejo de la liberĉiela minejo

Ŝtalprema Fabriko Finas la Jaran Produktionormon Antaŭdate

Ŝtalpremaj laboristoj de la ŝtata Centra Ĉina Ŝtalkingo plenumis sian produktan normon por 1952 je la 19a de oktobro, 70 tagojn antaŭdate. Ilia tuta produkto superis tiun de la lasta jaro je 154 procentoj kaj preskaŭ ĉiuj produktaĵoj estas laŭnormaj.

En la pasinta jaro la laboristoj elmetis pli ol 40 raciigajn proponojn, el kiuj 37 estas akceptitaj kaj efektivitaj.

Nun la laboristoj skribis al Prezidanto Maŭ Ze-tung por raporti pri siaj atingajoj, kaj garantiis produkti en la sekvontaj 70 tagoj aldonan kvanton da rulpremita ŝtalo egalan al pli ol 26 procentoj de la tutjara produktanormo. Tio ĉi, ili diras, estas por plifortigi la landon en rezistado al Usona agreso kaj ankaŭ por plibonigi la vivon de la popolo.

Popola Liberiga Armeo Kulturas Pli Multe da Tero en Lhasa

Por helpi evolui la ekonomion de Tibeto, la Popola Liberiga Armeo staranta en Lhasa preparas por la venontjara grandskala agrikultura produktado. Ili jam komencis sian vintran kulturadon de virga tero kaj konstruado kaj riparado de irigaciaj kanaloj. Ili planas plugi en tiu ĉi jaro ankoraŭfoje kulturitan teron kaj daŭre ekkulturi pli ol 366 hektarojn da virga tero. Aldone al tio, 2,490 metrojn longa kanalo estos kompletigita ĉi-vintre.

La armeanoj entreprenantaj la kulturadon de virga tero, dank' al la akiritaj spertoj kaj la plibonigitaj instrumentoj, jam altigis sian labor-efikon proksimume je tri obloj super tiu de la lasta vintro kaj ĉi tiu printempo.

Dombestoj Plimultiĝas en Interna Mongolio

La Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio kaj Sujjuan-provinco rapide progresis en bredado de dombestoj en tiu ĉi jaro. Pli ol 1,150,000 dombestoj estas aldonitaj al la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio kaj la laŭplana celo estas superita je 39 procentoj; kaj la dombestaro en Sujjuan-provinco plimultiĝis je 139.6 procentoj post la liberigo. Duono de la tuta loĝantaro de Interna Mongolio partoprenas bredadon de dombestoj.

La aktiva helpo de la Popola Registaro de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio estas la ĉefa faktoro por la atingita sukceso. Dum

la kuranta jaro, ĝi pruntedonis pli ol 4,200 milion janojn al la popolo de Interna Mongolio por bredado de dombestoj, kaj 18,000 milion janojn al la popolo de Sujjuan-provinco por la sama celo. Paŝtejoj sufiĉaj por provizi al pli ol 1,360,000 dombestoj jam estas konstruitaj en Interna Mongolio.

2,860,000 dombestoj en Interna Mongolio jam estas inokulitaj kontraŭ bovpesto kaj antrakso. La plej disvastiĝintaj kaj seriozaj brutomalsanoj en tiu regiono jam estas fundamente eliminataj. En Sujjuan-provinco 46 veterinaraj stacioj estas fonditaj, kaj 208 veterinaroj jam estas edukitaj.

Kuangtung Produktas Plimulte da Fiŝoj

Kuangtung-provinco havos riĉan kaptadon de 300,000 tunoj da fiŝoj en tiu ĉi jaro laŭ antaŭkalkulo. La



produkto de fiŝidoj en tiu ĉi jaro jam superis la antaŭmilitan nivelon je 25 procentoj.

La fiŝo-industrio de Kuangtung-provinco konstante kreskadas dum la pasintaj tri jaroj. La tuta fiŝkaptanta kvanto en 1950 estis 175,000 tunoj, kaj en 1951 estis 242,352 tunoj. En la unua duono de tiu ĉi jaro, 128,994 tunoj da fiŝoj estis kaptitaj.

Antaŭ la Kontraŭ-japana Milito, la jara fiŝkaptanta kvanto en Kuangtung-provinco konsistigis preskaŭ kvaronon de la tuta landa fiŝkaptanta kvanto. Sed en 1949, je la vespero de la liberigo de Kuangtung-provinco, la fiŝkaptado en tiu ĉi provinco reduktiĝis ĝis 55 procentoj de la antaŭmilita kvanto. Tiu ĉi akuta falo en fiŝkaptado estis rezulto de la subpremado al la fiŝistoj fare de la japanaj invadantoj kaj la Kuomintang-aj reakciuloj.

Serio da rimedoj estis adoptitaj de la Popola Registaro por helpi la fiŝistojn revivigi sian entreprenon.

Pli ol 53,000 milion janoj estis pruntedonitaj al ili en la pasintaj tri jaroj por helpi ilin ripari kaj aĉeti pli multe da retoj kaj boatoj, kaj merkatoj establiĝis ĉe ĉefaj centroj por maraj produktaĵoj.

Pli ol 100,000 fiŝistoj jam partoprenis teamojn aŭ kooperativojn de fiŝkaptistoj, kaj ankoraŭ pli multe da ili sin organizas nun por plue disvolvi la fiŝ-industriion de Kuangtung-provinco.

Sovetia Fandprocedo Kondukas al Nova Rekordo de Krudfera Produkto

Aplikinte Sovetian fandprocedon, blovforno en Anŝan, fama produktocentro de fero kaj ŝtalo en la Nordoriento, kreis novan landan rekordon en produkto de kruda fero je la 29a de oktobro. Tiutage ĝia produkto atingis 90 procentojn super la meznombra taga produkto de 1950, antaŭ la adoptiĝo de la Sovetia fandprocedo.

En tuta Anŝan, la meznombra produktokvanto de kruda fero pliiĝis je 39 procentoj post la adopto de la Sovetia fandprocedo. La fandistoj garantiis plenumi la produktanormon por 1952 11 tagojn antaŭdate en honoro de la Ĉinia-Sovetia Amikecomonato.

Valoraj Antikvaĵoj Eltrovitaj

Ŝton-kavernoj, kiuj konservas tre abundajn trezorojn de la ĉinaj historiaj artoj, estis eltrovitaj antaŭnelonge en Pingling-Templo, kiu lokiĝis en Jungcing-gubernio, Kansu-provinco. La artaĵoj en tiuj ĉi kavernoj, kompare kun tiuj en Tunhuang, estas konservitaj en multe pli bona ordo. Por fari fundamentan studon pri tiuj ĉi kulturaj trezoroj, la Kultura Ministerio de la Centra Popola Registaro kaj la Kultura Departemento de la Nordokcidenta Milita kaj Administracia Komitato jam en sept. ĉijare speciale organizis "Esploran Grupon de la Ŝton-kaverno de Pingling-Templo", por esplori, fotografi kaj reprodukti la eltrovaĵojn. Tiu ĉi malkovro ja kreis novan vastan kampon por la studo de antikvaj kulturo kaj artoj de nia lando. Tie oni nun jam eltrovis 35 ĉelojn kaj 87 niĉojn de la Tang-dinastio (618—906 p.K.) kaj la Norda-vej-dinastio (368—534 p.K.), en kiuj estas integraj ŝtonaj statuoj kaj bareliefaĵoj, kaj multaj murpentraĵoj kreitaj en la dinastio Norda Vej ĝis dinastioj Ming (1368—1643 p.K.) aŭ Ĉing (1644—1911 p.K.). Interalie, ankaŭ troviĝas klare legeblaj skribaĵoj en Siŝia-lingvo kaj Tibeta lingvo.

La Felico

Liu Vej-ĉen

— Daŭrigo —

IV

Ni trarampis sektion de serpentforma subtera vojo, pasis grimpe tri supren- kaj malsupren-turniĝejoj kaj alvenis al insida puto. Laŭ Ĉen lumigis ĝin per elektra torĉo kaj vidis, ke ĝi estas pli ol dek metrojn profunda kaj sube duone plenigita de akvo. Laŭ Hung metis tabulon super ĝi kaj ni transrampis laŭ la tabulo. Ree sekcio de serpentforma subtera vojo kaj du turniĝejoj. Poste troviĝis sekreta observejo, kiu povis enteni du homojn. Laŭ Hung turnis sian kapon kaj diris mallaŭte: "Laŭ Ĉen, tie ĉi supre estas la domo de Ĉen Vang-tien. Nia sekreta observejo estas la alta muro en la fronto de ĝia ĉefa konstruaĵo. Supre tie ni povas vidi ĉion en la ĉambroj." Retenante la spiradon mi suprengrimpis malrapide kun Laŭ Ĉen kaj rigardis tra trueto tiel malgranda kiel melonsemo sur la muro: jen antaŭ la pordo estis amaso da duone forbruligita lignokarbo. Ĉe la norda flanko de la fajroamaso etendiĝis litego el kunmetitaj tabloj, sur kiu kuŝis amase vico da japanaj diablidoj. Ĉe ambaŭ flankoj de la fajroamaso staris stativoj el pafiloj. Dume vento kaj pluvo muĝis furioze ekster la ĉambro.

El oni ne sciis kie aŭdiĝis tre malfortaj ĝemoj. Laŭ Ĉen ektiris min per la mano. Mi turnis min. Laŭ Ĉen cedis al mi la trueton sur la kontraŭa muro. Mi ŝvitis pro teruro je la ekrigardo. Ĉe la pordo de la ĉambro, kie loĝis la 'Vivanta Reĝo de Hadeso' pendis Onjo Ĉen. Ŝiaj vestoj estis disŝiritaj, la manoj kunligitaj surdorse. En fronto de ŝia kapo staris petrolampo kun ŝirmilo. Kaj apude kuŝis tranĉilo, ŝnuro, klabo, ferstango, lavpelvo k.t.p.. Mi levis mian kapon kaj eltiris longan spiron gapante. Mi ekaŭdis, ke Onjo Ĉen, kiu estis pendigita tre longe de la malamikoj, parolis senforte kun tremanta voĉo: "Mi ne diros, eĉ se vi pendigos min ĝis morto. Vi...vi servas al la diablidoj kiel sklavo kaj fihelpanto je la malutilo de la samlandanoj, ĉu vi ankoraŭ havas iom da homaodoro, Sun Dua?" Mi kredis, ke Sun Dua endormiĝis. Sed li eksaltis de sur la tablo kaj batojn pluvigis furioze sur la korpon de Onjo Ĉen. Tion aŭdante, Laŭ Hung bruspiregis. Ŝin batante Sun Dua insultis sarkasme: "Nun kiu el ni du pruviĝas pli kapabla! Provu forkuri, provu! Multe da ruzaĵoj vi lernis de la 'okavojanoj', vi alivestis vin! Sed vi ne scias, ke miaj akraj okuloj ekkonis la fabograndan nigran verukon sur via mentono." Kaj li aldonis: "Vi krias, vi vekis min per via kriaĉo, nun ankaŭ vian nazon mi ŝtopos..." Ni aŭdis, ke Sun Dua glatigis sian matracon kaj rekuŝiĝis. Mi kaj Laŭ Hung rigardis la lumhorloĝon kun malpaciencego. Dek minutoj pasis...dudek...tridek...kvardek... Ni atendis ĝis kiam aŭdiĝis neniu brueto, tiam ni grimpis malsupren. Laŭ Ĉen diris al mi mallaŭte: "Ekagu, tempo estas! Alie Onjo Ĉen estos mortigita pendige de Sun Dua!"

Dum la malamikoj dormis profunde, Laŭ Ĉen donis ordonon kaj en palpebruma daŭro la trupo jam ekmoviĝis en la subtera vojo. Laŭ Ĉen kondukis antaŭe, tuj post li sekvis la unua kaj la dua grupetoj; post mi estis la tria grupeto. Kiam ni rampis ĝis la

aperturo, Laŭ Ĉen ordonis kaj la batalantoj ripetis unu al alia laŭvice: "Atentu! Mallaŭtigu la bruon, ne eligu sonon!" Tuj poste Laŭ Ĉen grimpis supren kun subpelotonestro. Post tempdaŭro de pipo da fumado, pajlocindroj falis de sub la kaldrono, per kiu Onjo Ĉen kuiris manĝaĵon por la diablidoj. Ni sciis, ke Laŭ

Ĉen jam forigis la ferplaton, kiu sterniĝis en la fundo de la kameno. Pasis ankoraŭ momento la muĝado de ŝtormo miksitaj de ronkado de japanaj diablidoj alvenis al ni sub la tero. Ni komprenis, ke Laŭ Ĉen kaj lia kunulo formovis jam la kaldronon.

Niaj tri batalgrupetoj elrampis tre singarde. Sub la gvidado de Laŭ Ĉen la batalantoj rampis senbrue tra la malluma ĉambro ĝis la diablidoj; ili levis la hakilojn blankigitajn per kalko kaj nur atendis la ordonon kaj la lumigon de elektra torĉo por faligi ilin sur la diablidajn kapojn. Mi kaj la tria grupeto kaŭris sub la lito de la 'Vivanta Reĝo de Hadeso'. Ekbrilis elektra torĉo en la ekstera ĉambro, kaj tuj laŭtiĝis la hakado surdige.

La 'Vivanta Reĝo de Hadeso' kaj Sun Dua estis vekitaj el sia dormo. Sed antaŭ ol ili povis ellitiĝi rulfale, la batalantoj jam alĵetiĝis kiel tigroj kaj iliaj kapoj tuj fariĝis karnokaĉo sub la hakiloj. Laŭ Hung rapide malligis Onjon Ĉen. La malamikaj gardstarantoj sur la tegmentoj ekpafis, kaj tuj poste krakado de pafiloj, eksplodo de mangrenadoj leviĝis el ĉiuj direktoj en la vilaĝo kiel tondregoj en ŝtormo.

Trumpeto ekludis la signalon por kuratako. Ni sciis, ke la gubernia bataliono komencas la atakon de ekstere.

La malamikoj baraktis kaj atendis senpacience la helprupojn el la urbo. Ni klopodis ekstermi ilin antaŭ la tagiĝo. Niaj maŝinpafiloj okupis la tegmenton. La maŝinpafiloj ekkrakis kun trenajo de fajreroj, ke la malamikoj en la najbara korto eĉ ne povis levi sian kapon. "Antaŭen kun mi!" Kriante kun piedbato al la tero Pelotonestro Ĉen saltis en la korton kaj tuj sekve la batalantoj. Ni apenaŭ ŝirmis nin post muro interne de la frontpordo, la maŝinpafilaĵoj kugloj kaj mangrenadoj de la malamikoj jam pluvis en nia direkto. La tegoloj sur la muro disflugis sub la pafado. Refoja krakado el niaj maŝinpafiloj. La kamaradoj de la gubernia bataliono jam grimpis sur la tegmenton de la flankaj domoj. Nombro da mangrenadoj estis ĵetitaj al la tegmento de la norda domo ĝis la diablidaj pafiloj tute mutiĝis. Tiam Siaŭ Li trumpetis la venko-signalon laŭ la ordono de Pelotonestro Ĉen.

Ni grimpis sur la tegmenton de la norda domo per ŝtupetaro. La kamaradoj de la gubernia bataliono jam finkolektis la maŝinpafilojn kaj kuglojn de la diablidoj. Nin ekvidante ili kuris al ni el ĉiuj direktoj, forte premis niajn manojn kaj konkure demandis: "Ĉu Sun Dua, la hundido estas kaptita?" "Ĉu ne eskapis la 'Vivanta Reĝo de Hadeso'?" "Ne, ne, eĉ ne unu savis sin," respondis Pelotonestro Ĉen ridete kaj spiregis malstreĉiĝante, sed tiam lia korpo iom tremetis. La batalantoj rigardis atente kaj subtenis lin haste.

"Vi vundiĝis, Pelotonestro!"

Pelotonestro Ĉen mallevis sian kapon kaj rigardis. tiam li malfortiĝante kuŝiĝis sur la tegmenton. Dume ankoraŭ falis la pluvo kaj muĝis la vento.

Mi konfuziĝis. Timante ke la pluvo eniris lian vundon, mi tuj kovris lin per iu el la litkovriloj kiujn

la diablidoj rabis de la vilaganoj kaj portis lin surdorse malsupren de la tegmento.

Batalionestro Hoŭ alkuris kun kuracisto kaj sanitaristo, aŭdinte ke Laŭ Ĉen vundiĝis. Je la ekvido de la palflava vizaĝo de Laŭ Ĉen, li premis lian manon kaj demandis min kun riproĉa rigardo:

“Laŭ Liu, kial vi ne eskortis lin for kiam li estis vundita?”

Laŭ Ĉen malfermis siajn okulojn malrapide, premis pene mian kaj lian manojn kaj diris kun malforta voĉo: “Batalionestro, Laŭ Liu ne sciis, ke mi vundiĝis, eĉ mi mem ne konsciis pri tio. Nur grimpite sur la tegmenton, vidante pli ol dek kadavrojn de diablidoj kaj ke la kamaradoj estas kolektantaj la malamikajn pafilojn ridante, mi ekridis pro elkora ĝojo, mi eksentis doloron je la ventro dum la ektiriĝo de la abdomeno...” Ridetante li ankoraŭ volis daŭrigi, sed la batalionestro lin malhelpis: “Ne parolu plu, mi jam komprenas.”

Petinte la kuraciston bandaĝi la vundon de Laŭ Ĉen, la batalionestro klinis sian kapon kun rideto kaj varmigante la tempiojn de Pelotonestro Ĉen per la manoj, diris malrapide: “Vi studis atente la gerilan taktikon de Prezidanto Maŭ pli ol duonjaron, zorge kulturis la batalgrupetojn de la vilaĝa milico kaj tre bone fosis subteran vojaron, tial vi havas la hodiaŭan triumfon...”

Post momento Laŭ Ĉen refoje malfermis siajn okulojn kaj direktante rigardon al la kontraŭ li kuŝanta Onjo Ĉen, diris al la batalionestro: “Ĉion ĉi ni ŝuldas al Onjo Ĉen, mi faris nenion menciindan. Estas ŝi kiu kolektis la informojn, respondis la postulojn de la malamikoj kun dudek kvin maljunuloj kiam la diablidoj okupis la vilaĝon kaj dumtempe sendis al ni informojn; ŝi, ŝi estis torturita de Sun Dua la tutan nokton.”

Laŭ Hung levis tre singarde angulon de la kovrilo de Onjo Ĉen. Ŝi ekstremis tra la tuta korpo sed ne vekigis, nur delirante duondorme: “Rapidu, Laŭ Ĉen, Laŭ Liu!... La diablidoj grimpis sur la domojn! Ili bruligas la domojn!...” Kun la tempioj batantaj Laŭ Hung karesis ŝian kapon kaj diris ripete: “Aj, aj, aj! Rigardu... rigardu, kiuj estas tiuj?” Onjo Ĉen estis vekitaj, malfermis siajn okulojn, jetis rigardon al la ĉirkaŭstarantoj kaj diris ridetante: “Jes, estas niaj homoj!” Batalionestro Hoŭ klinis sin al ŝi zorgeme kaj diris: “Onjo, bone ripozu, ne grave, ni ĉiuj venis.”

La kuracisto ŝmiris ŝiajn vundojn per unĝento. La batalionestro tiris min al iu soleca angulo kaj min vokante per la nomo instrukciis kun flamantaj okuloj: “Portante kun vi Laŭ Ĉen kaj la onjon tuj forlasu la vilaĝon kun via pelotono. Rapidu al la destinita loko antaŭ tagiĝo, kaj lasu ĉi tiun batalkampon al mi. Tiu ĉi venko estas granda, sed ĝi kostas al ni ne malmulte. Kamarado Li Ho, ‘batalheroo’ de la bataliono falis glorie en la sieĝbatalo de Ĉiaŭtoŭ-urbeto!” Aŭdante, ke kamarado Li Ho mortis, mi eksentis acidan guston en la nazo kvazaŭ mi englutus plenbuĉon da mustardo kaj larmoj plenigis miajn okulojn.

La batalionestro daŭrigis: “Sed li ne mortis senvalore. Neniu el la diablidoj en Ĉiaŭtoŭ-urbeto eskapis kaj la arestitaj kadroj de tri gubernioj estas ĉiuj elsavitaj! Foriru rapide! De nun ni eternigu la memoron de la falintoj per niaj venkoj en la batalo!” Kun rapide batanta koro mi gvidis la pelotonon, portante kun ni Laŭ Ĉen kaj la onjon, rapidi al Siaŭ (malgranda) Ĉenkiaĉuang sub la pluveto. Survoje mi ĉiam meditis pri la instruo de la batalionestro: “De nun ni

eternigu la memoron de la falintoj per niaj venkoj en la batalo!”

V

Kiam ni apenaŭ elsendis la moviĝantajn sentinelojn post nia alveno al Siaŭ Ĉenkiaĉuang, oĉjo dommastro jam enpaŝis kun rondeta sako sur la dorso, en kiu kokoj kriis. Li demetis la tolsakon de la ŝultro dirante: “Jen kokoj kaj anasoj senditaj de nia tuta vilaĝo. Homoj plenigis la vilaĝan oficejon, ili volis vidi la pelotonestron kaj Onjon Ĉen, sed Distriktestro Ma malpersvadis ilin, timante ke via ĉeesto estus malkovrita de la malamikoj. Oni sendis min ĉi tien unue kun la donacoj kaj ili venos vespere.”

Post kiam mi forsendis oĉjon dommastron, mi reŝmiris la vundojn de Onjo Ĉen per unĝento kune kun areto da batalantoj. Mi intencis sciigi al ŝi la morton de K-do Li Ho, sed mi englutis la surlipajn vortojn, ekmemorante ke ŝi ankoraŭ ne resaniĝis; tamen pensante pri la grava efiko, kiun K-do Li Ho kontribuis al tiu ĉi batalo, mi diris ridetante malgraŭvole: “Bone ripozu, ni gajnu pli multe da venkoj post via resaniĝo!”

Onjo Ĉen neniam forgesis siajn filmsimilajn batalantojn, la distriktan pelotonon kaj la gubernian batalionon. Ĉiujn, kiujn ŝi iam vidis, ĉu bone konatajn ĉu ne, ŝi pridemandis unu post alia, kaj fine venis la vico de Kamarado Li Ho. Ŝi demandis tiel insiste, ke mi ne povis ne diri al ŝi la veron. Ŝi larmis dum momento kaj rakontis al mi:

“Ni estas geedzoj de frua aĝo. Mi pensas pri nenio alia krom lia bonkoreco kontraŭ ĉiuj. Kiam li havis nur dek kvar jarojn, li laboris kiel ŝiptrenisto kaj faris pezajn laborojn por vivteni la tutan familion. Kiam la diablidoj venis, Ĉang Kie, la unua komisaro de nia gubernio, vokis lin partopreni la gerilan batalon sub Komandanto Lju. Li vundiĝis kvinfoje kaj trifoje ricevis merit-ateston, kaj de simpla soldato promociiĝis ĝis rotestro. Feliĉan vivon li ne vivis ekde sia infaneco. Li eksuferis reŭmatismen je la gambo dum sia laborado sur la ŝipo... Sen li mi ne povis vivi ĝis hodiaŭ. En mia dek kvina jaro mi servis kiel kuiristino en la domo de Ĉen Vang-tien. Iutage, tiu maljuna bruto volis min perforti en la noktomezo, kaj mi dronigis min en la granda rivero. Kiam mi elvomis la akvon kaj vekigis, mi trovis min kuŝanta sur granda ŝipo. En la lunlumo mi turnis mian korpon kaj vidis apud mi junulon kun tramalsekigita vestaĵo, tiam mi kredis, ke mi refoje trafis en iliajn manojn kaj klopodis ruliĝi en la riveron. Sed li retenis min kaj demandis: ‘Ne timu, ne timu! Kial vi dronigis vin? En kiu vilaĝo vi vivas?’ Mi rakontis al li la maldecan agon de Ĉen Vang-tien en la noktomezo. Li tremis pro kolero kaj tuj vekis la kolegojn sur la ŝipo. Per la ŝipo ili eskortis min al lia onklino ĉe Sandaŭvan. La sekvintan tagon li kondukis min al mia hejmo. Mia patrino ne sciis kiel esprimi sian dankemon... Li havis nek loĝejon nek teron. Malgraŭ nia tre modesta vivo ni havis kvin mu-ojn da tombeja tero kiun ni heredis de la prapatroj. Fakte nur tri mu-oj krom la tombejo. Pro lia bonfaro, mia patrino plurfoje sendis peranton al lia patro por proponi min kiel lian edzinon kune kun la tri mu-oj da tero kiel doto. La propono multe plaĉis al lia patro. Niaj du familioj tiel kunigis sin interhelpe kiel fiŝo kaj akvo. Li laboris surŝipe, dum mi kaj mia frato kulturis la teron, ni tiel kune vivtenis la gemaljunulojn kaj vivis sufiĉe komforte. Li estis tre lerta en boksado. Post kelkaj jaroj venis al nia vilaĝo iu instruisto. Tiu estis Ĉang Kie la unua komisaro de nia gubernio. Tiu lasta

ankaŭ ŝatis skermadon. Ili rilatiĝis tre amike. Ĉiuvespere Ĉang Kie venis al li por ekzerci sin en boksado. De tiam ili fariĝis intimaj amikoj. Kiam eksplodis la rezistmilito, Ĉang Kie vokis lin partopreni la gerilan batalon. Pasis ankoraŭ du jaroj, kiam mi aliĝis al la Partio je la rekomendo de Laŭ Hung. Nur tiam li diris al mi dum lia hejmenreveno, ke li aliĝis al la Partio ankoraŭ en la tempo kiam Ĉang Kie instruis en nia vilaĝo. Li diris, ke sinjoro Ĉang estas veterana komunisto. Li ĉiam kaj ĉie rilatis amike kun la aliaj. Lian bonecon mi ne povas elĉerpi eĉ per tuttaga rakontado..." Tion dirante ŝiaj larmoj denove falis pluve.

VI

Post la glora morto de la edzo en la kontraŭjapana milito, Onjo Ĉen laboris kun la sama fervoro kiel antaŭe sed nur aspektis pli maljuna. Ŝia vojo estis peniga kaj ŝiajn eventojn oni ne povas finrakonti eĉ en la daŭro de tri tagoj.

En la vintro de 1944, en la Ŝansi-Ĉahar-Hopej-limregiono oni okazigis 'Kongreson de Herooj' kaj Onjo Ĉen estis elektita por ĝin partopreni. Dum la dudek-kvintaga kunveno ŝi aŭdis la raportojn de Nie Ĵung-ĉen kaj aliaj ĉefuloj kaj vidis diversajn heroojn de la limregiono. Ŝi ekaspektis pli juna kiam ŝi revenis kaj ofte diris al aliaj: "Se oni volas vivi feliĉe, ĉiuj devas leviĝi kaj lukti unuanime; por lukti oni bezonas persistecon kaj ne senkuraĝiĝu antaŭ malfacilaĵoj; ne nur fiksu vian rigardon al la persona intereso sed ĉiam konsideru la intereson de la amaso kaj de la venontaj generacioj kaj la perspektivon de la feliĉa estonteco; se vi esperas prosperon, bone sekvu la instruon de Prezidanto Maŭ!"

VII

Post la venko de la Rezista Milito, mi laboris en la Kampa Armeo kaj disiĝis de la malnovaj kamaradoj, Laŭ Ĉen kaj aliaj, kaj ankaŭ de Onjo Ĉen. En la ĉijara printempo mi reiris al Centra Hopej pro ia afero kaj survoje pasis tra la malnova regiono kie ni batalis peneghe en la pasinteco.

La printempa brizo blovis karese. Sur la vasta ebenaĵo de Centra Hopej la smeralda grenkamparo etendiĝis senlime.

Sur la verdaj kampoj kaj en legomĝardenoj la kamparanoj okupis sin je la printempa terlaboro pelante antaŭ si brutojn kun 'tpr-ohel'-krioj, manipulante plugilojn aŭ erpilojn.

Mi preterpasis Mativan, Fujang-rivero kaj iris tra la fruktarbarejo, kie brilis pompe ruĝaj persikaj kaj blankaj piraj floroj. Dolĉa odoro tiklis la nazon per ekblovoj. Inter la floraro rondflirtis are abeloj kaj papilioj.

Kiam mi iris rapide, subite iu maljunulino vokis min en la fronto: "Iom ripozu, kamarado!" Mi desaltis de la biciklo kaj je ekrigardo mi trovis tiun maljunulinon kun grizaj haroj kaj ruĝeflava vizaĝo tre bone konata. La maljunulino ja havis bonan memoron; ŝi alpaŝis memfide kaj alparolis ridante: "Ĉu vi ne estas Laŭ Liu? Ho! Kia favora vento vin alportas!" Mi ekkonis ŝin de ŝiaj rido kaj parolo. Mi eksentis varmon en la koro kvazaŭ mi vidus mian propran patrinon.

Onjo Ĉen surŝultrigis la stangon el saliko, kiun ŝi uzis por frapfali la pirflorojn kaj mi puŝis apud mi la biciklon. Ni iris ridante parolante en Ta Ĉenkia-ĉuang. Ĉirkaŭ la vilaĝo pirarboj kreskis en bona ordo

kun rondetaĵoj kaj freĝaj branĉoj, sed ili estis multe pli malaltaj ol tiuj sur la kamparo. Evidente ili estas junaj arboj, kiujn oni nove plantis post kiam la japanaj faŝist-banditoj faligis la maljunajn. Ĉe la piedo de ĉiu juna pirarbo restis ankoraŭ la dika restaĵo de la patrina korpo. Tiuj junaj pirarboj, etendante siajn fortikajn brakojn,—branĉojn kun freŝe verda foliaro,—kvazaŭ dirus fiere al la homoj: "Jen ni denove kreskas!"

Alveninte al la hejmo de Onjo Ĉen, mi vidis nove konstruitan frontan pordon, brike masonitan kaj tegole tegitan. La muroj ĉe ambaŭ flankoj de la pordo estis ĵus grize pentritaj. Mi transpaŝis la sojlon kaj trovis novan ĉirkaŭkonstruaĵon kun kvadrata korto en la mezo, en kiu aro da grandaj kokinoj bekis la grajnojn klukante post granda flava koko nigre makulita. La pordo de la okcidenta flankdomo estis nove alfiksita kaj la nigra kolorilo ankoraŭ ne sekiĝis. Ĉe la maldekstra flanko de la pordo alligiĝis flava bovo kun ronde grasa korpo, kiu remaĉis kuŝante sur la tero. Ĉe la dekstra estis metitaj novaj plugilo kaj manmanipulebla herbopremtranĉilo.

Kiam mi eniris la ĉambron, Onjo Ĉen tuj sternis la litkovrilon kaj petis min kuŝiĝi por ripozi. Mi sidis sur la nova litkovrilo kaj vidis kaplevante kromolitografian portreton de Prezidanto Maŭ, ĉirkaŭ unu futon altan, enmetitan en orpentrita kadro. Ambaŭflanke estis versparo skribita sur orita ruĝa papero. Sur unu oni legis: "Helpi koreion kontraŭ Usono por defendi la patrion kaj la hejmon," kaj sur la alia: "Konstrui nian landon per produktado por vivi riĉe kaj feliĉe". Sur la muroj ĉie pendis novjaraj pentraĵoj pri produktado kaj bildserioj pri Liu Hu-lan kaj La Blankhara Knabino. Flanken puŝante la pordkurtenon Onjo Ĉen eniris kun poto da bolanta akvo, du porcelanaj vazetoj kaj korbon da arakidoj. Ŝi diris ridante: "Vi trinku mem. Nun en la vilaĝo oni okupiĝas je grandskala produktado kaj kunvenis tuttage antaŭhieraŭ... Ĉu vi memoras Laŭ Hung?"

"Memoras, memoras! Ĉu li ne estis la unua ĉefsekretario de via vilaĝo?" Antaŭ ol mi povis finparoli. Onjo Ĉen jam interrompis kun ridanta vizaĝo: "Jes, jes, nun li estas nia distrikta komisaro. Hodiaŭ li venis pro la interhelpaj grupoj." Kiam mi volis informiĝi pri Laŭ Hung, ŝi jam diris ordone: "Mi ne lasos vin foriri, jam malfruas. Mi iras kuiru vespermanĝon por vi kaj mi havas ion diri al vi ankoraŭ..."

Dum Onjo Ĉen iris kuiru, mi unuope restis en la ĉambro duonkuŝante kaj duonsidante kaj meditis silente: la domo, la pirarbarejo kaj la produktaj instrumentoj estas tute novaj; eĉ la vatitaj vestaĵoj sur ŝia korpo estas el nova tolo; ŝia vizaĝo estas ruĝa kaj grasa, ŝajnas ke ŝi vivas feliĉe. De ŝiaj ĝoja mieno kaj fortika spirito oni povas profunde kompreni ke la kamparanoj estas liberigitaj.

Mia rigardo ektrafis la figuron de Liu Hu-lan en la bildo sur la muro. Ŝi subtenas vunditan liberigan batalanton kaj kuras heroece sub la kuglopluvoj... Kvazaŭ fulmo trabrilis mian cerbon, mi rememoris la tiaman cirkonstancon kaj la devenon de la feliĉo kaj, ŝajnis al mi, eĉ la multjara luktado ankaŭ estis feliĉo, ĉar mi emociiĝis de tiom multe da noblaj agoj. Kaj mi pensis: nun la kampara ekonomio restas ankoraŭ en la etapo de individua ekonomio, la kamparanoj ĵus ricevis sian parcelon da tero kaj komencas plialtigi la produktivon. Se oni estonte efektivigos la socialisman socion, tiam aperos pli alta feliĉo! Kompreneble, tio

postulos longedaŭran luktadon. Ni batalu ĉiam pli heroece kaj grandioze!...

VIII

“Laŭ Liu, manĝu, Laŭ Liu!”

La krio de Onjo Ĉen rompīs mian pensfadenon.

Mi sidiĝis respondante, levis la varman kaj bonodoran farunaĵon kun dishakita cepo kaj manĝis kun apetito. Eksvingiĝis la pordkurteno kaj enkuris infano simila al tigrido, kun diketa figuro, nigre ruĝa vizaĝo kaj du brilaj leopardaj okuloj. Li tenis en mano librotekon. Li rigardis min fikse, tiris Onjo Ĉen je la vestangulo kaj demandis ripete: “Avino, avino, ĉu tiu oĉjo okavojano venis de paĉjo?” Onjo Ĉen karesis lian hararon kaj respondis serioze: “Jes, jes ja, li batalis antaŭe kune kun via patro kontraŭ la japanaj diablidoj kaj nun batalas kune kontraŭ la Usonaj!” Mi sciis, ke tiu estas la infano de Siaŭ Li, mia malnova kamarado kaj tuj elprenis la bombonojn kiujn mi kunportis el Pekino por donaci al li. Onjo instruis lin: “Siaŭ Tu-kaj (malgranda agrara reformo), Siaŭ Tu-kaj, salutu oĉjon!” Siaŭ Tu-kaj alkuris ĝoje ridante, premis mian manon kaj salutis varme. Li demandis de kie mi venis. Aŭdinte, ke mi venis el Pekino, li saltis kun malfermita ruĝa buŝeto kaj demandis ridante: “Prezidanto Maŭ vivas en Pekino, ĉu vi vidis lin?” Karesante liajn vangojn mi respondis imitante lian mirplenan mienon: “Jes, mi vidis. Tute sama kiel la portreto sur la muro.” Li ellasis mian manon, turnis sin al la muro kaj rigardis absorbite.

Rigardante al la nepeto kvazaŭ ŝi meditus pri io, Onjo Ĉen diris malrapide: “Laŭ Liu, nun ni ĝuas feliĉan vivon, sed tiun ĉi feliĉan vivon ni ne akiris facile!” “Ĉu feliĉo?” respondis mi. “Ĝi estas nur la komenco, pli granda feliĉo ankoraŭ estos en la estonteco!” Ŝi kapjesis. Post paŭzeto, ŝi denove diris zorgplene: “Dum ĉi tiuj tagoj en la kunveno, Laŭ Hung ofte ripetis: ‘Ni forpelis lupon, sed jen venas tigro. Tiu tigro—la Usona imperialismo—estas nur pafvundita paper-tigro, sed ni devas ĝin bati kiel veran tigron!’ Laŭ Hung ankaŭ diris: ‘Nun la Usona papertigro subtenas la japanojn kaj volas invadi nian landon por fari malutilojn al ni...’ Laŭ Liu, vi ja komprenas kiom da sango kostis al ni tiuj ĉi feliĉaj tagoj! Ni ne permesas la Usonajn diablidojn denove veni nin atenci! Ni viroj kaj virinoj, junaj kaj maljunaj, ĉiuj unuigiu, ĉiu klopodu fari kion ajn li aŭ ŝi povas fari por ke ni povu vivi feliĉe en la estonteco; ni havis la persistecon por batali kontraŭ la japanaj diablidoj, ĉu la Usona papertigro povas bari al ni la vojon!”

Dum ni interparolis, Laŭ Hung, mia malnova batalkamarado flankenpuŝis la pordkurtenon kaj envenis. Li rigardis fikse dum momento, poste alkuris premi ambaŭ miajn manojn kaj diris ridante kun malfermita buŝego: “Laŭ Liu, ĉu vi scias kiel mi sopiris al vi? Laŭ Liu, hodiaŭ vi devas resti kaj helpu nin solvi problemon.” “Bone!” mi respondis. “Onjo jam diris al mi ke vi estas en la vilaĝo. Mi alvenis je la dekdua kaj jam atendis vin kvar horojn.” Aŭdinte ke mi efektive ne foriros tiun tagon, li ridis laŭte. Sur lia vizaĝo plimultiĝis la sulketoj. Kvankam li plimaljuniĝis, sed li restis same fortika kiel antaŭe, kaj lia voĉo—same laŭta kaj sonora.

IX

Vespere, Laŭ Hung kunvokis la vilaĝajn kadrojn por diskuti kiel pli bone gvidi la produktajn interhelp-grupojn. Ili kunsidis ĝis la noktomezo.

Vidante ke mi rigardas la poŝhorloĝon, Laŭ Hung timis ke mi estus tro laca kaj proponis al la kamaradoj ke ĉiuj hejmeniru por dormi. Sed la juna vilaĝestro demandis pri la aferoj de Pekino kun entuziasmo:

“Ĉu troviĝas grandaj fabrikoj en Pekino? Kiom da traktoroj kaj akvoradoj oni produktas po-tage?”

Li demandis pri ĉio, de Prezidanto Maŭ ĝis la laboristoj, de Ĉefkomandanto Ĉu ĝis la batalantoj, de la aera forto kiu flugas sur la ĉielo ĝis la meĥanizitaj taĉmentoj kiuj kuras sur la tero.

“Kiom manĝas Prezidanto Maŭ kaj Ĉefkomandanto Ĉu ĉiufoje? Kiel ili fartas?”

“Kiom da laboristoj troviĝas en Ŝekingŝan-fabriko?”

“Kiom da karbo produktas Mentoŭkoŭ-minejo?”

“Kiel aspektas la Sovetuniaj amikoj?”

“Ĉu ankoraŭ troviĝas sekretaj agentoj en Pekino? Ĉu ili estas mortpunitaj kiam arestitaj?”

“Ĉu estas tigroj en la Ĝardeno de Ĉiaj Bestoj?”

“Kiel aspektas la palaco de la Manĉuaj imperiestroj?”

.....

Dumtage mi veturis naŭdek li-ojn per biciklo. Kiam mi eniris la hejmon de Onjo Ĉen, mi jam sentis rigidcon en la membroj kaj la korpo iom doloris dum ilia kunveno. Sed mi respondis ĉiujn demandojn pro ilia entuziasmo. Fine ili volis, ke mi klarigu al ili la nunan internacian situacion. Hazarde mi portis ĉe mi notlibron, en kiu troviĝis la raporto de K-do Ĉang Ven-tien pri la estanta situacio. Post kiam mi iom parolis laŭ tiu raporto, je mia miro, mi trovis ke ili scias tre multe, eĉ la ĝeneralan enhavon de la parolado de U Siu-ĉjuan en la Unuigitaj Nacioj. Mi demandis pri la kaŭzo ĝisfunde kaj eksciis, ke estas en la vilaĝo grupetoj por ĵurnal-legado, ‘viva brodkasto’ kaj perioda kunveno de la vilaĝanoj. La komisaro por publika klerigo kaj la instruisto de la elementa lernejo elektis la materialon kaj gvidis dudek ok ĵurnal-laŭtleĝantojn laŭ la instrukcio de la distrikto. La laŭtleĝantoj estas ĝenerale la lernantoj de la supera elementa lernejo. Ĉiumonate okazis kunveno de la vilaĝanoj, en kiu sendito de la distrikta registaro klarigis al ili gravajn aferojn de la ŝtato, leĝojn kaj instrukciojn de la registaro kaj spertojn de produktado.

Ni parolis ĝis la dua postnoktmeze, kiam Onjo Ĉen atentigis ilin malpacience: “Iru dormi! Ĉu morgaŭ ni ne okazigos kunvenon por adiaŭi solene la trejnotojn?” Nur pro plurfoja urĝado de Onjo Ĉen kaj Laŭ Hung ili disiris vole nevole. Mi akompanis ilin eksteren kaj vidis, ke la brila luno sur la ĉielo jam pendas precize en la sudo. Nokta brizo alblovigis odoron de pirfloroj. De ekster la vilaĝo aŭdiĝis de tempo al tempo jubila muziko de tamtamoj kaj tamburetoj miksite de oreplaca kantado de Hopeja ‘bangze’. Laŭ Hung diris al mi post momenta priaŭskultado: “Tio estas la sidanta kantado en Siaŭ Ĉenkiaĉuang.”

Mi reiris kun Laŭ Hung al la hejmo de Onjo Ĉen kaj trovis ke Siaŭ Tu-kaj endormiĝis jam. Onjo Ĉen kondukis nin en la ĉefan ĉambron por dormi. Enirante mi rimarkis ke kovrilo kaj matraco estas jam orde sternitaj sur la terlito. Mi diris mallaŭte al Laŭ Hung: “Tiu ĉi onklino prizorgas nin kiel patrino, tute same kiel en la pasinteco.” Laŭ Hung jesis kaj aldonis ridante: “Ŝi traktas ĉiujn egale, ĉiam zorgas la aliajn tre detale kaj ankaŭ zorgas pri la laboro kun tia fidindeco. Tial la vilaĝanoj ŝin respektas pli multe ol siajn proprajn gepatrojn.”

Mi kaj Laŭ Hung apenaŭ kuŝiĝis, kiam Onjo Ĉen enpaŝis kaj diris ridante sed serioze: "Laŭ Hung, ĉu vi ne ofte diris, ke la homo kaj la pafilo neniam disiĝu unu de la alia? Sed kie vi lasis la kuglojn?" Laŭ Hung ekstultiĝis: "Jes ja! Tiel malatenta mi estas! Mi lasis ilin sur la terlito ĉe la vilaĝestro!"

Onjo Ĉen metis la kuglojn apud la kapkuseno de Laŭ Hung kaj eliris. Mi aŭdis, ke ŝi unue portis fojnon al la brutoj kaj poste reiris al sia ĉambro por dormi.

Laŭ Hung kuŝis vizaĝ-al-vizaĝe kun mi kaj rakontis pri la malnovaj kamaradoj dum la Rezista Milito, Laŭ Ĉen, Siaŭ Li kaj aliaj. Li preterlasis neniun el tiuj kiujn mi konis. Ni endormiĝis nur kiam la tagiĝo-herolda koko kriis la duan fojon.

X

La sekvantan tagon mi estis vekita de la bruo de tamtamoj kaj tamburetoj, kiam la leviĝanta suno jam lumigis la duonon de la fenestro. Mi turniĝis kaj ne trovis Laŭ Hung. Mi komprenis, ke li leviĝis frue kaj okupis sin je la laboro de grandskala produktado en la vilaĝo. Aŭdinte mian tusadon Onjo Ĉen envenis kun kruĉo da akvo kaj emajlita lavopelvo. Ŝi diris ridante al mi: "Ho, Laŭ Liu, vi tre laciĝis hieraŭ kaj multe parolis endorme. Vi vokis Ĉen Tie-kjun—pelotonestro Ĉen, Laŭ Hung kaj min. Nu, Laŭ Ĉen ofte demandis pri vi; nun li resaniĝis, li iradas ĉie kun artefarita piedo. En la pasinta jaro li vizitis nian vilaĝon. Vi ne povas imagi, kiel fortika li aspektis. La superaj aŭtoritatoj prizorgas lin kaj asignis al li produktan laboron en la malfronto. Nun li estas administranto de ŝtata farmo en Sinzi. Li diris, ke vi iris al Koreio por batali kontraŭ la Usonaj diablidoj. Kiam li aŭdis, ke usonanoj bombadis freneze la Nordorienton, li petis permeson ĉe la aŭtoritatoj reiri al la fronto, sed oni ne konsentis. Li diris: se li ne estus ekssoldatigita, li nepre levos pafilon por elverŝi sian indignon! Laŭ Liu, skribu leteron al li!" Mi konsentis kaj tuj elprenis

mian plumon, skribis leteron kaj komisiis ĝin al Onjo Ĉen.

Mi apenaŭ finis mian matenmanĝon, bruoj de tamtamoj kaj tamburetoj denove eksplodis sur la strato. Ĉina klarneto ludis tre agrable melodion de bangze-opero "Marŝado sur Neĝa Montaro" en "bangze-ario. Aplauĉoj kaj ĝojridoj kunfluis ĥaose.

Ĉe la sojlo mi renkontis Laŭ Hung kiu alvenis ridante kaj diris premante mian manon: "Tridek ok gejunuloj en tiu ĉi vilaĝo registris sin memvole por iri lerni produktan teknikon en la ŝtatformo, kaj nun oni solenas ilian foriron."

Pli ol tridek junuloj kaj kelkaj junulinoj kun ruga floro ĉe la brusto sidantaj en tri grandaj veturiloj pasis antaŭ la pordo. Vilaĝanoj premiĝis svarme ĉirkaŭ la veturiloj kaj lernejoj infanoj, svingante diverskolorajn flagetojn, kriis laŭte sloganojn.

Kune kun Laŭ Hung, Onjo Ĉen, mi ankaŭ miksiĝinte en la homamaso akompanis ilin ĝis la alia fino de la fruktarbaro. La kolomboj en la grenkampoj, timiĝitaj de la bruego de tamtamoj kaj tamburoj, flugis are al la ĉielo kaj krozis libere en la ora sunbrilo; kelkaj el ili faris petolajojn kaj pafiĝis supren kaj mal-supren unu post alia kun la zumanta ventfajfilo sur si. Ŝajnis, ke ili jubilis pro la libera ĉielo, la fruktodona ebenaĵo kaj la feliĉaj popolanoj.

Ni alvenis al vojkruciĝo. Mi adiaŭis Laŭ Hung kaj Onjon Ĉen nur post multe da amikaj atentigoj unu por la alia.

Elĉinigi S. J. Hsu

¹ Anoj de la Liberiga Armeo.

² Bone konata menaĝerio en Pekino.

³ Unu speco de lokaj operoj.

⁴ En kiu oni kantas operajn kantojn sen alivestado kaj ludado.

Hinda Popolo Salutas Korean Popolon

En la Packongreso de la Azia kaj Pacifika Regionoj

— Juan Ŝuj-po —

Ŝi longan jupon trenas blankan kiel norda neĝo.
Kaj ŝi en vesto flavigita de l' sunbrilo ekvatora.
Jen unu koreino, kaj hindino la alia,
Alpaŝas ambaŭ sin renkonte ĉe l' kolomb' fluganta.
En la Kongres' ektondras pluve manklakad' fervora.

Ŝi pasis tra la ter' de gasoleno bruligita.
Kaj baron ŝi transiris de mensog' kaj antaŭjuĝo.
Donaco de naci' antikva al popol' heroa—
"Ĝjothi"—lampo inter aro da aromaj floroj.
Ĉi ĉio jam klarigas al vi sen parolo plua:

"Flamo—la animo nia, kaj la flor'—pureco ĝia.
Hero-fratinoj miaj!
Neniam estingiĝu via gloro kiel "ĝjothi"!
Hero-fratinoj miaj!
Per fort' neniun povas kontraŭ vi komploti!"

Ĉe norda fin' Azia loĝas ŝi, kaj ŝi ĉe l' suda,
Intere baras la montaroj, kaj la oceano.

Sed du patrinaj koroj batas samatakte!
Fratine ili ĉirkaŭpremas sin elkore,
Kaj kiel ili, miksasentimente larmas ĉiu kongresano.

Vi sangmakulon viŝas for de korpo ŝia,
Kaj ŝi karesas vian vundon de mil jaroj:
De unu varmaj larmoj fluas en la bruston del' alia.
Parolo superfluas. En la brust' de ĉiu viro aŭ virino
brulas sama volo.

Parolo superfluas. Tiu ĉirkaŭpremo estas de la paca
orient' simbolo!

Tradukis S. J.

Rimarko de la verkinto: La duan tagon de la Packongreso, la hinda delegitaro prezentis siajn donacojn al la korea delegitaro. Inter la donacoj estas "ĝjothi"-lampo, kies alegorian ideon oni povas legi en la poemo.

FELIĈAN NOVJARON KAJ NOVAJN SUKCESOJN AL NIAJ KARAJ LEGANTOJ KAJ KUNLABORANTOJ

EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno eldonata
de Fremdlingva Eldonejo

Redakcio: 26 Kuo Hui Chieh,
Peking, Ĉinio

Administracio: 38, Suchow Hu-
tung, Peking, Ĉinio.

ENHAVO

*Bildo sur la kovrilo—La Tria
Ŝtata Ĉevalbredejo en Interna
Mongolio ankaŭ prenis sur sin
la taskon bredi merinojn.*

Al Vieno por Paco

Usono Intencas Pereigi la
Armistican Intertrakton

Sovetiaj Specialistoj en la In-
dustria Konstruado de Ĉinio

La Granda Sukceso de Novĉinia
Agrikulturo en la Pasintaj Tri
Jaroj

La Flava Rivero Subjugigas

Unu Tago en Montvilaĝo

Dekmil-jara Karbo Elteriĝas

Feliĉo

Hinda Popolo Salutas Korean
Popolon

PAGU AL NIAJ PERANTOJ

- Aŭstrio :** (1) Steve Bennett, Flat 3, 62 Brighton Av., Croydon Park, N. S. W. (Jarabono 7s. 6p.)
(2) (por abono:) A. Keesing, G. P. O. Box 4836, Sydney.
(3) (por aĉeto:) Current Book Distributors, 40 Market Street, Sydney, NSW.
- Aŭstralio :** Antonio Balague, St.-Pölten, Kirchenweg 12. (Jarabono 20 schilling-oj)
- Belgio :** Walraevens Rajmundo, Rabelais Strato, 10, Bruselo. (Poŝtekkonto: 16, 43, 53) (Jarabono: 50 bfr.)
- Britlando :** F-ino F. Paraige, 10 Woronzow Road, St. John's Wood, London, N. W. 8. (Jarabono 6 ang. ŝil.)
- Bulgario :** (1) Bulgara Esperantista Kooperativo, Sofia—Str. TRI UŜI, 15. (Jarabono 8 Lv.)
(2) Ivan Kovaĉev, Sofia, str. "Iv. Bigor" no. 24.
- Ĉeĥoslovakio :** Burda Rudolf, Plzen-palackeho N. ĉ. 6.
- Danlando :** Hans v. Bindner, Poppelalle 76, Vivu Hareskovby. (Jarabono 6 kronoj)
- Finnlando :** Niilo Kavenius, Niklaksenkatu 10/14, Turku 9. (Jarabono: 300 Fmk.)
- Francio :** Labor-Esperantista Federacio (Jarabono: Fr. F. 450)
- Germanio :** (1) Helmut Löffler, Mittweida/Sachsen, Theaterstrasse 1. (Jarabono: 6 D.M.)
(2) Helny Knorr, (24) Hamburg-Wellingsbüttel, Ekerkamp 81.
- Hungario :** (1) KULTURA, Budapest, V. Akademia u. 10. (Jarabono 15 forintoj)
(2) Marton Lajos, Bors.-u. 2, Budapest, XII, (poŝtkonto 38.187)
- Indonesio :** Kho Khwat Liat, Post Box 115, Surabaya, Java. (Jarabono: 10 Rp.)
- Islando :** Siguldur Gudmundsson, Falkagata 1, Reykjavik. (Jarabono 15 kronoj)
- Italio :** Eduardo Zumbo, Casella postale 226, Torino. (Jarabono: 400 liroj)
- Izraelo :** Bencion H. Danon, Kibuc Afikim. (Jarabono: 400 prutoj)
- Japanio :** (jarabono 360 jen-oj)
- Meksiko :** (kaj aliaj sudamerikaj landoj): Jezevo Serrano L., Central de Talabarteros 72, Col. E. Carranza, Mexico, D. F. (Jarabono: 5 pesoj)
- Nederlando :** Esperanto-Grupo Vaals, Pr. Bernhard-str. 4, Vaals. (Jarabono fl. 3.50)
- Pollando :** Asocio de Esperantistoj en Pollando, Warszawa Marszalkowska 81/32. (Poŝteka konto I—4329/113) (Jarabono 12 zl.)
- Rumanio :** Rumana Esperantista Societo, București I, Bulev. 6 Martie 15, et. I. (Jarabono: 120 leoj)
- Svedio :** Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg. (Jarabono 5 kronoj)
- Usono :** (jarabono \$1.25)

Rim:

Legantoj en aliaj landoj povas pagi per respond-
kuponoj (1 rk. kontraŭ 1 ekz.) aŭ egalvaloraj Esp-aj
libroj (sed ne gazetoj). Senpagan specimenon ni
sendos al ĉiu kiu letere postulos.

